


GERDA MALAPERIS !

# INSTRUILARO



GEJ



*Gerda malaperis!*

# Instruilaro

Kontribuis: Eva Formaggio  
Remi Grinciene  
Horst Gruner  
Patricia Pawlyk  
Claude Piron  
Thomas Pusch

Grafikis: Thomas Pusch

Kunordigis: Horst Gruner

Eldonis: Germana Esperanto-Junularo  
Deutsche Esperanto-Jugend  
Einbecker Straße 36  
10317 Berlin  
tel./faks. +49 30 42857899  
dej@esperanto.de

Unua eldono 1991, kvina represo 2005

enhavo

- ◆ antaŭparolo
- ◆ antaŭ la kurso
- ◆ ĉapitroj 1 ĝis 25
- ◆ ludoj
- ◆ suplemento

# La Gerda Malaperis! - materialo

de Claude Piron

## **Gerda malaperis!**

Lingvo-instrua romaneto. 1981, 48 paĝoj. Mendebla ĉe Fonto, UEA, GEJ kaj diversaj libroservoj.

## **Lasu min paroli plu!**

35 mallongaj rakontetoj kaj monologoj. Kroma legomaterialo al ĉiu el la 25 ĉapitroj de *Gerda malaperis!*. 1984, 125 paĝoj. Mendebla ĉe Fonto, UEA kaj diversaj libroservoj.

## **Vortlisto**

Traduko de la novaj vortoj kaj strukturoj laŭ la ĉapitroj de *Gerda malaperis!*.

angla*	mendebla ĉe UEA, EAB, ELNA kaj KEA
belorusa*	petu informojn ĉe GEJ
ĉeĥa*	petu informojn ĉe GEJ
franca*	mendebla ĉe FEL kaj UFE
germana*	mendebla ĉe GEJ kaj diversaj libroservoj
hispana*	petu informojn ĉe GEJ
itala*	petu informojn ĉe GEJ
kroata*	petu informojn ĉe GEJ
litova	mendebla ĉe UEA
nederlanda*	mendebla ĉe UEA kaj FEL
polaa*	petu informojn ĉe GEJ
portugala*	petu informojn ĉe GEJ
rumana*	mendebla ĉe UEA
sveda*	mendebla ĉe UEA

\*) elŝutebla ĉe [www.esperanto.org/gerda/vl](http://www.esperanto.org/gerda/vl)

krome por blinduloj: germana brajla - petu informojn ĉe GEJ

# Post la Gerda-kurso

de Claude Piron

## **Ili kaptis Elzan!**

Humura, streĉa aventuro baziĝanta sur la vortprovizuo de *Gerda malaperis!*. 1985, 100 paĝoj. Mendebla ĉe Fonto, UEA kaj aliaj libroservoj.

## **Vere aŭ fantazie**

Kolekto de 44 rakontoj el diversaj mondopartoj. Ĝi komence postulas la konon de 405 vortoj. En ĉiu rakonto aldoniĝas kelkaj vortoj tiel ke je la fino de la libro la lernanto konas la mil plej oftajn vortojn en Esperanto. 1989, 211 paĝoj. Mendebla ĉe Fonto, UEA kaj aliaj libroservoj.

## **Dankon, Amikol!**

Romaneto pri aventuroj de junulo, kiu perdis ĉiun monon eksterlande, en facila Esperanto. 1990, 36 paĝoj. Mendebla ĉe Pro Esperanto, UEA kaj aliaj libroservoj.

## **La kisa malsano**

Viruso malsaniĝas tutan popolon - sed ne la Esperantistojn. Streĉa, ironia kaj humura romano. Per la *Gerda*-vortaro oni komprenas 93 % de la vortoj. Enkonduko en terminaron de la ekonomia kaj politika vivo. 1991, 77 paĝoj. Mendebla ĉe Pro Esperanto, UEA kaj aliaj libroservoj.

## BABILE PRI OFTE MISKONATA LINGVO

*Kio estas Esperanto?*

Lingvo.

*La lingvo de kiu lando, de kiu popolo?*

Ĝi estas lingvo sen popolo, sen lando.

*Se tiel, ĉu ĝi povas esti lingvo?*

Jes, ekzistas lingvoj senpopolaj, supernaciaj. Tia estis la latina en la mezepoko. Tia estas la sanskrita, uzata en Hindio, kiu rezultas el aranĝo farita de unu homo: Panini. Tia estas nun la svahilia. Ne ekzistas svahilia popolo: tiu lingvo estas miksaĵo de pluraj dialektoj, oportune aranĝita por interŝanĝoj inter diverslingvaj etnoj. Tamen ĝi estas la oficiala lingvo de Tanzanio, kie oni nomas ĝin lingvo *interteritoria*.

*Kiel Esperanto estiĝis?*

La bazo de la lingvo estas broŝuro, kiun D-ro Zamenhof publikigis en 1887 en Varsovio kun la titolo "Lingvo Internacia" kaj la pseŭdonomo "D-ro Esperanto". Li estas, se tiel diri, la patro de la lingvo. Tiu broŝuro estas la semo, kiun li ĵetis, esperante, ke ĝi ĝermos. Por ke ĝi ĝermu, necesis grundo. Tiu grundo ekzistis: homoj el ĉiaj popoloj, kiuj sopiris je tutplaneda komunikado, je vastigo de sia kultura horizonto, sed kiuj ne havis la tempon aŭ energion por lerni la tiamajn grandajn komuniklingvojn: la francan, la germanan kaj la anglan. Tiaj homoj eklernis la lingvan materialon proponitan de Zamenhof, konstatis, ke ili rapide asimilas ĝin kaj ke ĝi bone taŭgas por interkomuniki, kaj ili komencis uzi ĝin, unue skribe, poste ankaŭ parole. Tiel naskiĝis kolektivo, kiu, jam 15 jarojn post la publikigo, inkluzivis homojn el la tuta mondo. La nomoj sur listo publikigita en 1902 tion atestas: Asayiro Oka (Japanio), Ganuna (Tunizio), Ravelojaona (Madagaskaro). Adresoj en Helsinki, Melbourne, Reykjavik, Montrealo, Tientsin, Urga (Mongolio), Petropolis (Brazilo) kaj ĉiaspecaj aliaj lokoj troviĝas sur tiu listo. Oni povas diri, ke tiuj homoj kune estas la patrino de la lingvo: ili estas la grundo, kiu akceptis la semon, kaj, laŭ sia propra naturo, transformis ĝin. Ili lernis la lingvon por komuniki, kaj tuj abunde komunikis. Multaj ankaŭ verkis en la nova lingvo. Tiel la propono de Zamenhof transiĝis de skriba projekto al lingvo vivanta laŭ plej natura procezo: per uzado.

*Ĉu la lingvo ŝanĝiĝis, rilate al la komenca projekto?*

Jes kaj ne. La bazaj principoj de gramatiko, vortformado, prononco ne ŝanĝiĝis. Ankaŭ ne la baza vortprovizo. Sed la senco de kelkaj vortoj aliĝis, multaj novaj radikoj enmetiĝis, la stilo iom post iom iĝis pli fleksebla. Ĉar la uzantoj estis diversnaciaj, ili jen konscie, jen, plej ofte, nekonscie, per reciproka influo, evoluigis la lingvon laŭ la postuloj de tutplaneda interkompreniĝo. Okazis do natura evoluo, kiel en ĉiu lingvo, sed Esperanto neniam perdis sian originan simplecon.

*Se ĝi estas simpla, ĉu tio ne signifas, ke oni povas uzi ĝin nur je elementa nivelo? Kiel, en simpla lingvo, eblas filozofie rezoni, poezie verki aŭ esprimi delikatajn sentojn?*

Pensi tion estus kvazaŭ alpreni la vidpunkton de ĉino, kiu opinius, ke per simpla alfabeto ne eblas esprimi ideojn vere altnivelajn, por kiuj necesus skribo kun centmiloj da ideogramoj. Sed nia dudekkvino da literoj kombiniĝas tigrade, ke ili ebligas skribi pri ĉio, same kiel la sep notoj de la gamo sufiĉas por verki mirindajn muzikaĵojn aŭ kiel, per nur kelkaj ĥemiaj elementoj, Naturo estigis neimageble riĉan kaj diversan kreaĵaron. Kio igas ion kapablan je riĉeco kaj altniveleco, tio estas, ne komplikaĵoj, sed la rajto libere, senbare kombini. Esperanton karakterizas tia rajto.

*Kion signifas via esprimo "la rajto libere kombini"?*

Esperanto – kiel la ĉina – konsistas el senvariaj elementoj, kiuj ligiĝas unu al la alia por formi vortojn. En la ĉina, "mia" ne estas aparta vorto, kiel la angla *my*, la franca *mon*, la germana *mein*, kiuj tute ne rilatas kun la koncerna pronomo, respektive *I*, *je*, *ich*. En la ĉina, "mi" estas *wo* kaj por formi "mia", oni simple aldonas al ĝi la adjektivan-genitivan markon *de: wode*, "mia". Esperanto funkcias ekzakte same. La konceptoj esprimiĝas per kunmeto de senvariaj elementoj. Por redoni la sencon de la angla *to heal*, de la franca *guérir*, de la germana *heilen*, oni diras *resanigi*: *san* estas la baza elemento, kiu esprimas la ĝeneralan ideon de fizika bonfarto, *ig* signifas "fari ke", "fari tia aŭ tia" [kiel *ig* en la germana *reinigen* ("purigi", el *rein*, "pura") aŭ en la latina *mitigare* ("mildigi" el *mitis*, "milda")], fina *-i* indikas, ke la koncepto estas uzata kiel infinitiva verbo, kaj komenca *re-* signifas "denove". *Resanigi* do fakte estas: "igi denove sana". Pro la rajto libere kombini, vi povas uzi iun ajn radikon en la sama strukturo. Ekzemple, se vi lernis, ke por esprimi la koncepton pri juneco la radiko estas *jun*, vi povas mem formi la vorton *rejunigi*, dum en la angla, ekzemple, la fakto koni la vorton *young* ne helpas vin trovi *to rejuvenate*.

*Sed ĉu tia sistemo ne devigas uzi tre longajn vortojn?*

Kelkaj vortoj estas pli longaj, kelkaj multe pli mallongaj. Se vi komparas la serion en la franca *système*, *systématique*, *systématiquement* kaj ĝian tradukon en Esperanto: *sistemo*, *sistema*, *sisteme*, vi vidas, ke la simpla fakto povi esprimi la manieron per eta *-e* mallongigas la vorton per 50%. Vorto kiel *krajone* ("with a pencil", "avec un crayon") aŭ titolo kiel *Internacia Kiber-netika Asocio* estas pli mallongaj ol iliaj tradukoj en ĉiuj okcidentaj lingvoj. Se oni komparas la saman tekston en diverslingvaj versioj, oni konstatas, ke la esperanta ĝenerale estas iom pli mallonga.

*Kiun rilaton havas tiu libera kombinaĵo kun esprima riĉeco?*

Se oni observas Esperanton en ĝia efektiva uzado, oni konstatas, ke ofte la homoj spontane kreas per libera kombino vortojn, kiuj ne ekzistas en ilia gepatra lingvo. Vi tiel povas unuvorte esprimi konceptojn kiel *samlingvano* ("persono kun la sama lingvo"), *fotinda* ("inda esti la objekto de foto") aŭ *kisema* ("inklina kisi"), kio ne eblas en la plimulto el la aliaj lingvoj. Libera kombinaĵo de elementoj igas la lingvon ege riĉa sen perdi ĝian simplecon.

*Ĉu eblas esprimi koleron aŭ amon en Esperanto?*

Kompreneble. Ĉu vi jam havis okazon koleri en fremda lingvo? Se jes, vi certe konstatis, ke estas tre malfacile esprimi sin tiaokaze. Kial? Ĉar la komplikaj gramatikaj reguloj kaj la neeblo libere vortfari bremsas aŭ haltigas la fluon de la nerva energio. En lingvo, en kiu ĉio funkcias regule, vi esprimas sentojn multe pli facile ol en lingvo, en kiu la vortigado konstante batigas ĉe malpermesoj, esceptoj aŭ arbitraj klasadoj kiel la genroj. Memori, ke "libro" estas vira en la franca, neŭtra en la germana, kaj ina en la rusa estas malfacile; tiaj komplikaĵoj, pure tradiciaj, t.e. sen bazo en la realo, ege malhelpas la spontanegan fluon de esprimado. En la momento, kiam oni volas sentigi sian indignon, diri sian suferon aŭ paroli pri amo, lingvo libera je tiaj komplikaĵoj montriĝas pli oportuna ol la aliaj.

*Sed ĉu tia reguleco ne estas nehoma?*

Tute ne. Kelkaj lingvoj, kiel la ĉina aŭ la indonezia, estas same regulaj. Sed ĉefe vi komprenos, kiel natura estas regula esprimado, se vi observos la lingvaĵon de infanoj, de fremdlingvanoj aŭ de homoj parolantaj influate de forta emocio. Tiuj observoj rivelas, ke la plej natura tendenco de homa lingva esprimado estas ĝeneraligi la elementojn, kiujn oni antaŭe asimilis. Ekzemple, jen germana infano, kiu, demandite: *Bist du müde?* ("ĉu vi estas laca?"), respondas: *ich bist nich müde*, anstataŭ *ich bin nicht müde* ("mi ne estas laca"), jen angla infano kiu, konstatinte, ke oni diras *arms* ("brakoj"), *heads* ("kapoj"), *legs* ("kruroj"), ktp, diras *foots* anstataŭ *feet* ("piedoĵ"):

ambaŭ sekvas la naturan tendencon ĝeneraligi. Same faras lerninto de la itala, kiu eksciinte, ke oni diras *grandezza* ("grandeco"), *altezza* ("alteco"), *bellezza* ("beleco"), ekprononcas *profondezza* ("profundeco") anstataŭ la ĝusta vorto *profondità*. Tiuj homoj nur sekvas la naturan tendencon de la cerbo elekti la plej regulan, konsekvencan, facilan programon, se komputiliste paroli. Esperanto ĉiam sekvas tiun naturan tendencon. Tial ĝi estas, psikologie, la plej kontentiga komunikilo en interkulturaj interŝanĝoj.

*Sed ĉu povas ekzisti lingvo sen historio?*

Kompreneble. Kiam vivis Julio Cezaro, nek la franca, nek la itala, nek la hispana ekzistis. Ili ekzistas nun. Ekzistis do tempo, kiam tiuj lingvoj estis same junaj kiel Esperanto nun. Lingvoj naskiĝas kaj mortas. Ekzistas hodiaŭ lingvoj pli junaj ol Esperanto, ekzemple la *pisin*, kiu estas unu el la oficialaj lingvoj de Nov-Gvineo, aŭ la *Rumantsch Grischun*, oficiala kvara lingvo de Svislando, kiu estis ellaborita tute konscie en la jaroj okdekaj, surbaze de la diversaj romanĉaj dialektoj, por havigi al la koncerna loĝantaro unuigitan formon de lingvo.

*Tamen, ne povas ekzisti lingvo sen literaturo, ĉu?*

Multaj lingvoj longe vivis sen literaturo, sed Esperanto ne estas unu el ili. Jam en la unua broŝuro de Zamenhof troviĝis poemo, kiu, parenteze, estas malfacile tradukebla eĉ en literaturan lingvon kiel la francan, kio pruvas la esprimovon de la lingvo jam en sia infanaĝo. Ek de la komenco, homoj perceptis, kiel riĉe kaj bele eblas sin esprimi en Esperanto; estas ja lingvo, en kiu oni sentas sin libera. Ili do arte uzis ĝin. Tiel naskiĝis literaturo pli riĉa ol tiu de multaj lingvoj en la unua jarcento de ilia ekzistado. Se vi volas kontroli ĝian kvaliton, vi trovos ĉion necesan, almenaŭ el la vidpunkto de poezio, en: William, Auld, red. *Esperanta Antologio* (Roterdamo: UEA, 1984), 887 paĝoj. Tiu libro enhavas 706 poemojn originale verkitajn en Esperanto de 163 poetoj el 35 landoj, en kiuj ĉiu mondoparto estas reprezentita.

*Ekzistas do libroj en Esperanto, ĉu?*

Jes. Nun aperas proksimume unu titolo ĉiun trian aŭ kvaran tagon. Ekzistas ankaŭ diskoj, kasedoj kaj bildostriaj albumoj. Ne ekzistas ĉiutaga gazeto, sed aperas diversaj periodaĵoj.

*Kaj kio pri televido kaj radio?*

Escepte de Ĉinio, kie la televido diversloke dissendas kursojn de Esperanto, la lingvo ne estas uzata per tiu komunikilo. Sed multaj radiostacioj uzas ĝin, ĝenerale sur mallongaj ondoj (por certigi tutmondan aŭdeblon). Radio Polonia, en Varsovio, elsendas en Esperanto trifoje ĉiutage, same kiel Radio Pekino. Ankaŭ Romo, Vieno, Vatikano, Zagrebo, Svisa Radio Internacia kaj aliaj plurfoje semajne dissendas esperantlingvajn programojn.

*Ĉu Esperanto estas ligita al iu ideologio? Al politika partio? Al religio?*

Ne. Ekzistas mondaj Esperanto-asocioj katolika, protestanta, budhisma, ateisma, ktp. Nova politika partio transnacia, la radikala partio naskita en Italio, ege favoras ĝin. En pluraj landoj ankaŭ la ekologiaj, t.n. verdaj partioj, havas rilate al ĝi favoran sintenon. Tamen en ĉiuj partioj kaj ideologiaj medioj, escepte de la faŝismaj, troviĝas kaj Esperanto-uzantoj kaj homoj, kiuj kontraŭas tiun solvon al la monda komunikproblemo.

*Kial ne troviĝas esperantistoj en faŝismaj medioj?*

Ĉar Esperanto estas kvazaŭ enkarniĝo de la ideo de reciproka respekto de la popoloj. Oni ne povas esti esperantisto, se oni rigardas unu popolon ĝenerale supera al la aliaj. Esperanto favoras dialogon inter diverskulturanoj sur egaleca nivelo. Tial oni kelkfoje malprave rigardis ĝin kiel utopian movadon celantan estigi pacon per nura alprenado de lingvo. Tio estas absurda:

esperantistoj ek de la komenco sciis, ke esti samlingvaj ne sufiĉas por pace rilati. Sed estas vere, ke, ĝenerale, esperantistoj favoras dialogon prefere ol perforton kiel manieron solvi la problemojn interpopolajn.

*Interese, kvankam tio ne forprenas mian fundamentan dubon: mia opinio, lingvo, kiu estas nenies familia lingvo, ne povas normale funkcii.*

Vi embarasas min. Se al ĉiu demando via, mi respondas plej pozitive pri Esperanto, vi emos ne kredi min. Sed kion mi povas fari, krom priskribi la realon, realon cetere facile kontroleblan? Estas fakto, ke Esperanto funkcias tute normale. Kiel interkomprenilo uzata inter diverslingvanoj, ĝi montriĝas en la praktiko ege pli efika ol la angla, ekzemple, kaj ĝi estas tute senkosta, kontraste kun tradukado kaj samtempa interpretado. [Ĉu vi scias, ke la tradukado de dokumentoj en la Eŭropa Komunumo kostas 500 000 usonajn dolarojn ĉiutage? (Roman Rollnick, "Word mountains are costing us a fortune", *The European*, 20-22 decembro 1991, p. 6.)]. Aliflanke, vi eraras opiniante, ke Esperanto estas nenies familia lingvo. En la Esperanto-mondo organiziĝas jam de unu jarcento internaciaj kongresoj, turismaj aranĝoj, renkontiĝoj ĉiaspecaj. Diversoriginaj gejunuloj tiaokaze ekkonas unu la alian; ĉu miri, ke tiel formiĝas dunaciaj paroj? Estas nature, ĉu ne? Ofte, la sola lingvo komuna al ambaŭ estas Esperanto, kiu do fariĝas la familia lingvo kaj la gepatra lingvo de la infanoj. Multaj tiaj paroj ekzistas. Ankaŭ ili evoluigis la lingvon. Fakte, Esperanto estis kaj estas uzata ĉie en la mondo en ĉiaj situacioj. Ke ĝi funkcias tute bone konstatis itala lingvisto, kiu studis ĝin surtere (Alessandro Bausani, "L'esperanto, una lingua che funziona", *Affari sociali internazionali*, 1981, 1, reproduktita en *L'esperanto*, Pizo: Edistudio, 1982, quaderni k-10, pp. 32-36).

*Ĉu Esperanto havas fakajn terminologion?*

Jes. En pluraj sciencaj, filozofiaj kaj soci-politikaj kampoj de la moderna vivo, ĝia terminologio fakte estas pli malnova ol tiu de la araba kaj de la ĉina.

*Se Esperanto havas tiom da bonaj kvalitoj, kiel vi klarigas, ke ĝi tiel malmulte disvastiĝis?*

Tio estas ege kompleksa demando, en kiu rolas faktoroj politikaj, sociaj kaj psikologiaj. Eble la plej konciza maniero ilin resumi estus diri, ke Esperanto estas miraklo. Ke vigla, esprimriĉa, ĉiurilate taŭga lingvo povis fondi el la laboro de unu junulo laboranta sola (Zamenhof ankoraŭ ne estis 30-jara, kiam li publikigis sian broŝuron, kaj li ne havis monon por disvastigi ĝin), tio estas ege neprobabla: estas normale kredi, ke tio ne povis okazi. La natura skeptikismo alianciĝis al politikaj kaj sociaj interesoj por malhelpi objektivan diskonigon de la vero pri Esperanto. Tio plej bone vidiĝas en la reago de respektive malgrandaj kaj grandaj potencoj ĉe la Ligo de Nacioj en 1922, kiam la demando pri Esperanto estis diskutata. Pro tiuj diversaj faktoroj, misinformado pri Esperanto disvolviĝas kaj sin vivtenas mem. Multaj ĵurnalistoj kaj politikistoj, eĉ lingvistoj, verkas aŭ parolas pri ĝi sen konscii sian nescion, nur ripetante kalumniojn, kiuj datiĝas de la komenco de la jarcento.

*Mi ĵus parolis pri la negranda disvastiĝo de Esperanto, sed eĉ ne demandis rekte pri tiu. Diru: kiom da homoj scipovas Esperanton en la mondo?*

Kiel scii? Ne pli eblas respondi al tiu demando ol al tiu, kiom da homoj scipovas la germanan en Francio, aŭ la grekan en Rusio. Ne ekzistas statistikoj pri tiaj aferoj. Kaj kion signifas scipovi? Multaj homoj, kiuj ofte uzas kaj la anglan kaj Esperanton, scipovas Esperanton pli bone, regas ĝin kun pli granda sento de sekureco ol la anglan. La vorto scipovi do ne havas la saman sencon por la du lingvoj. Multaj personoj lernis Esperanton, sed poste neniam plu uzis ĝin. Kie ili situas, rilate al via demando? Estas malfacile diri, ĉar se ili devas reparoli Esperanton, ili komence opinias, ke ili ne kapablos, ke ili ĉion forgesis, sed sperto montras, ke la povo esprimi sin revenas en ili multe pli rapide ol ĉe aliaj lingvoj, verŝajne pro la absoluta kohereco de Esperanto, pro ĝia pli granda konformeco kun la naturaj tendencoj de lingva esprimado. En kelkaj ĉinaj urboj, la nombro da homoj lernantaj Esperanton nuntempe kalkuliĝas per centoj da

miloj. Sed kiom da ili vere vivtenos sian scipovon de la lingvo? Tamen mi ne volas doni al vi la impreson, ke mi rifuzas klare respondi. Jen do pli neta informo: laŭ Pierre Janton, unu el la fakuloj pri Esperanto, profesoro ĉe la Universitato de Clermont-Ferrand, estus en la mondo inter 2 kaj 3,5 milionoj da esperantistoj (Pierre Janton, *L'espéranto*, Parizo: Presses universitaires de France, 1989, p. 112).

*Cu Esperanto ne estas tro okcidenta lingvo, ne uzebla mondscale?*

Strukture, gramatike, vortforme, Esperanto estas pli proksima al la lingvoj de Orienta Azio ol al la hindeŭropaj. Kiel vi ĉi-supre vidis, la maniero formi *lia* el *li*, aŭ *samlanda* el *sam* kaj *land*, tute paralelas la ĉinan sistemon, dum nenio simila retroviĝas en la okcidentaj lingvoj. Stile kaj sintakse, Esperanto estas slaveca. Fonetike, ĝi estas kvazaŭ miksaĵo de latinidaj kaj sudslavaj lingvoj. Vortare, ĝi integras kontribuojn ĉefe el la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj, tiel ke ĝi tiurilate iom kompareblus kun la angla aŭ la romanĉa. Oni konstatis, ke por tipa japano, je sama hornombro semajna, unu jaro de Esperanto ebligas atingi komuniknivelon, por kiu li bezonas 8 aŭ 10 jarojn en la kazo de la angla. La sukceso de azianoj ĉe literaturaj konkursoj esperantlingvaj atestas, ke tiuj popoloj sentas sin preskaŭ tiel hejme en Esperanto, kiel okcidentanoj.

*Kion signifas: "Esperanto estas facila"?*

Facileco varias laŭ la personoj, la metodo, la cirkonstancoj. En eksperimento farita en Zagreb, montriĝis, ke infanoj, post 36-hora kurso de Esperanto sciis komuniki kvanton da informoj, kiujn iliaj kamaradoj studentaj la germanan ekpovis komuniki nur post kvar jaroj da lernado. Meznombro, oni povas diri, ke Esperanto estas 8-oble pli facila ol la plimulto el la lingvoj. Esperanto donas sekurecon al tiu, kiu uzas ĝin: kiam vi lernis la finaĵojn, kiu signas la pluralon, aŭ la futuron, vi scias, ke vi povos uzi iun ajn substantivon plurale, iun ajn verbon future, sen risiko erari: esceptoj ne ekzistas kaj ne povas ekzisti. En lingvoj kiel la angla, la germana, la franca, la rusa, vi neniam havas tian sekurecon. Sed la relative granda facileco de Esperanto ne signifas, ke eblas ĝin scii sen lerni. Por ĉiu popolo ĝi prezentas malfacilaĵojn, kiuj malsamas laŭ la gepatra lingvo. Tiuj diferencas de la malfacilaĵoj de la aliaj lingvoj du-aspekte: 1) ĉiu malfacilaĵo havas sencon por komunikado (dum 90 elcentoj el la komplikaj de naciaj lingvoj ne helpas al interkompreniĝo: egale ĉu oni diras *der Buch* aŭ *das Buch*, *foots* aŭ *feet*, interkompreniĝo okazas); 2) malfacilaĵoj ja ekzistas, sed ege malpli multe ol en la plimulto el la ceteraj lingvoj.

*Se en fremda urbo vi aliras personon surtrotuare, kaj tiun esperantlingve alparolas, vi ne havos ŝancon ricevi respondon, ĉu?*

Vi pravas. Sed tio validas pri iu ajn lingvo, kiu ne estas la loka aŭ landa lingvo. Provu alparoli iun ajn surstrate en la angla en Francio! Cu vi scias, ke en Hongkongo, brita de 1842 ĝis 1997, 90% el la policistoj ne kapablas doni plej simplan informon en la angla? Nur en ĝermanaj landoj vi havas relative bonajn ŝancojn ricevi respondon tiulingve. En la cetero de la mondo, ekster anglalingvio, por paroli la anglan, vi iras al difinitaj lokoj: hoteloj, aviadkompanioj, turismaj oficejoj, profesiaj aferkontaktoj, ktp. Same pri Esperanto: vi aliĝas al iu monda Esperanto-asocio, kaj tiel ricevas la adresojn de la lokaj reprezentantoj de tiu organizaĵo.

*Kiel Esperanto rilatas al la regionaj lingvoj?*

Respekte, kiel al ĉiuj lingvoj. Multaj esperanto-uzantoj estas fervoraj regionistoj. La aŭtoro de unu el la plej konataj lernolibroj de svisgermana dialekto - Baur, Arthur. *Schwyzertütsch - Grûezi mîtenand* (Winterthur: Gemsberg-Verlag, 1977) - longe estis la redaktoro de Svisa Esperanto-Revuo. Ekzistas en esperanto 401-paĝa *Kataluna Antologio* (Barcelono: Editorial Ibérica, 1931). La esperantlingva verkisto Jaume Grau Casas publikigis ankaŭ en la kataluna (ekz. *Del Parnás dels Pobles*). Fakte, ĉiu lingvo havas difinitan nivelon: regionan, nacian aŭ mondan. Homo, kiu parolas dialekte en sia regiono, nacilingve kun alilokaj samlandanoj kaj Esperante kun homoj el plej malproksimaj landoj, havas pli riĉan lingvovivon ol tiu, kiu scipovas nur sian nacian lingvon kaj iom provas balbuti la anglan, kiam li aŭ ŝi devas rilati kun fremdlingvano.

*Ĉiu lingvo havas ankaŭ sian spiriton. Uzantoj de Esperanto devas bedaŭre senti la mankon de spirito propra al tiu lingvo.*

Esperanto havas propran spiriton. Kio difinas la spiriton de lingvo, tio estas, parte, ĝia historio kaj la historio de la kolektivo, kiu vivigas ĝin, kaj, parte, ĝiaj lingvaj strukturoj. Esperanto havas ambaŭ. La libereco, per kiuj lingvoelementoj kombiniĝas, jam per si mem havigas al la lingvo propran spiriton. Sed spiritkree agis ankaŭ la literatura tradicio, la tradicio de kongresoj kaj internaciaj renkontiĝoj, de reciprokaj vizitoj, ktp. Fakte, ĉiu kolektivo post iom da tempo havas propran spiriton. Tio validas same pri eklezio, ĥoro, sporta societo aŭ partio politika. La Esperanto-kolektivo, en unu jarcento da ekzistado, iom post iom havigis al si tiun apartan spiriton, kiun kreis la sperto komuniki en grupoj tre diversnaciaj kun la sama facileco kiel propralingve. Tiu travivaĵo estas unika kaj estigis apartan senton de solidareco, kiu iel stampis ankaŭ la lingvon mem.

*Sajnas, ke vi havas respondon favoran al Esperanto je ĉiu mia demando. Kaj tamen mia skeptikeco ne forsvenis...*

Nur sperto ebligas juĝi. Tiel longe, kiel vi aliros Esperanton de ekstere vi ne konos ĝin. Ĉu oni scias vere, kio estas malsuprenŝvebi paraŝute, se oni neniam paraŝutis, aŭ kion signifas vivi en afrika vilaĝo, se en tia loko oni neniam restis? Same estas pri lingvo. Por povi juĝi ĝiajn kvalitojn, ĝian utilecon, ĝian valoron, estas neniu rimedo krom eklerni ĝin. Sed mi ne volus efektiviĝi sur vi premon. Faru, kion vi volas. Same kiel la gramatiko de Esperanto respektas ĉiun lingvoelementon, kiu ĉiam restas si mem, egale kia ĝia funkcio en frazo aŭ vorto (kontraste kun la konstanta "difektado" de radikoj aŭ afiksoj en hind-eŭropaj lingvoj), same Esperanto emas respekti la liberecon de la homoj. Neniam, nenie ĝi trudis sin. Neniam ĝi faris agresan reklamadon. Eble tio estas unu el la kaŭzoj de ĝia, laŭ vi, eta diskoniĝo. Kaj tamen, iom post iom ĝi disvastiĝas, atingante novajn teritoriojn, novajn sociajn mediojn. Tion ĝi faras sen reklami, sen helpo de ŝtatoj, multnaciaj kompanioj, politikaj aŭ ekonomiaj potencoj, nur per tio, ke ĝiaj enaj kvalitoj nature disradias. Se vi volas partopreni en tiu ege animriĉiga vivo, vi estas bonvena. Se vi preferas resti ekster ĝi, via elekto estos respektata. La decido apartenas al vi.

# antaŭparolo

---

GERDA MALAPERIS! ne similas al aliaj lernolibroj de la Internacia Lingvo. Ŝparemo forma kaj riĉeco enhava kombiniĝas al libreto, kiu nin tute ne memorigas pri pena lingvolernado lerneja.

Ekde tutkomence, la lernanto plonĝas en amuzan kaj kaptan rakonton, kiu rapide malfermas pordojn al pluaj rakontoj. Kune, tiu rakontaro peras grandegan lingvan trezoron per modesta radikaro, do modesta lernkvanto.

GERDA taŭgas por la lernado je internacia nivelo. Plej grandan utilon ĝi povus havi en lingvujoj, kie ne jam ekzistas nacilingva lernolibro, ĉar la vortlisto de GERDA estas simplarimede tradukebla kaj multobligebla. Nuntempe, kiam lernantoj kutime ne pretas investi multan tempon en la lernadon de Esperanto, tia internacia lernolibro, kia GERDA, kapablas doni jam dekomence guston de la internacia kulturo, kiun Esperanto peras.

Al la kursgvidanto, Piron lasas plejeble grandan liberon, kiel organizi la instruadon pere de GERDA. Tio saĝas, ĉar internacia lernolibro povas esti nur kadro por instru-manieroj plej diversaj, adaptitaj al lerngrupoj kulture, eduke, aĝe malsamaj.

Tamen, ni konstatis ke preparo de instruiloj por GERDA - demandoj, klarigoj, ekzercoj, tabeloj, ludoj, ktp. - postulas ege longan tempon. Tial ekestis la ideo kunporti ĉiun materialon jam ellaboritan por poste reuzi aŭ pludoni ĝin.

La unuan eltajpaĵon vi tenas nun en la manoj. Ĝi estu nur komenco. Ne ĉio estas vere praktike testita, kelkaj eroj montriĝos neuzeblaj, kelkaj korektendaj, plibonigendaj. Mankas ankoraŭ multo. Viaj rimarkoj, kritikoj kaj propraj ellaboraĵoj do estas tre bonvenaj. Komuniku ilin al ni, kaj vi fariĝos kunaŭtoro de dua, ĉiurilate pli bona instruilaro. Sendu viajn kontribuojn al GEJ ĝis la 1-a de marto 1992.

Ekzercoj kaj gramatikaj indikoj kutime aperas ĉe la plejeble frua ĉapitro. Vi povas uzi ilin ripetocele ankaŭ en postaj ĉapitroj, kaj adapti ilin laŭbezone. La ludojn ni pli libere atribuis al ĉapitroj. Uzu nur la ludojn kiuj plej plaĉas al vi, kaj ripetu la sukcesintajn.

A4-paperformaton kaj malavaran spacouzon ni elektis por ke vi povu fotokopii materialon por viaj lernantoj.

Horst Gruner

## antaŭ la kurso

---

Homoj, kiuj eklernas Esperanton, kutime tion ne faras pro devo, sed pro ioma scivolo kaj simpatio. Ili faris grandan paŝon al Esperanto, ĉar la plejmulto da homoj, informitaj pri Esperanto, decidas pridubi, ridindigi aŭ simple ignori ĝin.

Tamen, interesito ne jam estas konvinkito. Ofte el kurskomencantoj nur 10 elcentoj aŭ malpli restas ĝis la lasta leciono kaj daŭrigas la studadon. Plimultas tiuj, kies sciosoifo rapide kvietiĝas, kiuj seniluziiĝas konstatinte ke oni devas serioze lernadi - malgraŭ la laŭdita facileco de la lingvo. Iuj iĝas eĉ malamikoj de Esperanto post unua rigardo en ĝian internon.

Per informado kaj motivigado, antaŭ kaj dum la kurso, instruisto povas limigi tiajn reagojn nedeziratajn. Ĉi tiu ĉapitro celas kolekti proponojn, kiel oni povas organizi speciale antaŭkursajn aranĝojn.

## MATERIALO POR INFORMADO PRI ESPERANTO

### Bestonomoj

Tiu eta "krucvortenigmo" tre bone montras la vortfaradon en Esperanto. Ĝi donas ekzemplon de la grandeco de vortkampoj, kiuj konvene disponeblas en Esperanto per afiksoj ĉie uzeblaj, ĉiam samsignifaj.

Se vi volas uzi ĝin kun neesperantistoj, preparu fotokopiotan folion jene: Kompletigu nacilingve ĉiun keston, kiu jam havas bestonomojn, plus la malplenajn por virkoko, kokino, kokido. Preparitaj folioj por la germana kaj la litova troviĝas en la suplemento.

Celo estas ke la partoprenantoj mem trovu la mankantajn vortojn en la tri lingvoj. Vi indikos ke la esperantaj vortoj ili povas eltrovi per simpla komparo, kaj post kvaronhora laborado, ili konstatos, ke ili efektive trovis ĉiujn nomojn en Esperanto. En sia propra lingvo, multaj ne konas ĉiujn nomojn, kaj des malpli en la angla, eĉ se ili ĝin lernis intense.

### SOLVOJ:

esperante:	ĉevalo, virĉevalo, ĉevalino, ĉevalido koko, virkoko, kokino, kokido hundo, virhundo, hundino, hundido porko, virporko, porkino, porkido ŝafo, virŝafo, ŝafino, ŝafido bovo, virbovo, bovino, bovido kapro, virkapro, kaprino, kaprido
angle:	horse, stallion, mare, foal chicken, cock/rooster, hen/chicken, chick dog, dog, bitch, pup(py)/whelp pig, boar, sow, piglet sheep, ram, ewe, lamb cattle(pluralo), bull/ox, cow, calf goat, billy(goat)/he-goat, nanny(goat)/she-goat, kid
germane:	Pferd, Hengst, Stute, Fohlen Huhn, Hahn, Henne/Huhn, Küken Hund, Rüde, Hündin, Welp (Haus-)Schwein, Eber, Sau, Ferkel Schaf, Schafbock/Widder, Schaf, Lamm Rind, Stier/Bulle/Ochse, Kuh, Kalb Ziege, Ziegenbock, Geiß/Ziege, Kitz/Zicklein
itale:	cavallo, stallone, cavalla, puledro gallina, gallo, gallina, pulcino cane, cane, cagna, cucciolo maiale, maiale, scrofa, porcello pecora, ariete/montone, pecora, agnello bue, toro, mucca/vacca, vitello capra, capro, capra, capretto
hungare:	ló, ló, kanca, csikó tyúk, kakas, tyúk/jérce, csibe kutya/eb, kutya/eb, nöstény kutya/szuka, kölyökkutya sertés, kan, disznó/koca, malac joh/birka, bak/kos, joh/birka, bárány marha, bika, tehén, borjú kecske, bakkecske/kecskebak, nöstény kecske, (kecske) gida/göbölye
litove:	arklys, kumelys, kumelé, kumeliukas višta, gaidys, višta, viščiukas ŝuo, ŝuo, kalé, ŝuniukas kiaulé, kuily, kiaulé, paršiukas avis, avinas, avis, ériukas karvé, jautis, karvé, veršiukas ožka, ožys, ožka, ožiukas

# BESTONOMOJ

horse	stallion	mare	foal
ĉevalo	virĉevalo	ĉevalino	ĉevalido
chicken			
koko			
dog			
hundo			
pig			
porko			
			lamb
			ŝafido
		cow	
		bovino	
	billy-goat		
	virkapro		

# ĉapitro 1

---

## *Komenco bona – laboro duona*

(Zamenhof)

Kiel oni bone komencas instrui per "Gerda"? Certe estas pluraj eblecoj. Se vi decidis, antaŭ la ekinstruo paroli pri Esperanto (vd. la proponojn en "antaŭ la kurso"), vi povis jam prezenti kelkajn lernajojn de la unua ĉapitro. Ankaŭ, vi povis jam disdoni la romaneton kaj vortliston. Se la lernantoj havis tempon, hejme sole jam tralegi tekston kaj vortaron de la unua ĉapitro, tiam komenco al vi pli facilos. Tamen, ofte la realo ne estas tia, kaj vi devos des pli lerte enkonduki ilin en la relative grandan lernoprogramon de la unua ĉapitro. Vi povas unue fari la ekzercon "aŭskulti kaj imiti", sekve prezenti alfabeton, elparolon kaj akcentadon. Poste vi laŭtlege la tekston por doni ekzemplon de ĝusta elparolo. Sekve eblas klarigi kelkajn bazajn elementojn, kiel -a, -e, -o, -as, -in, mal-, kaj poste du lernantoj laŭtlege la tekston. Samtempe du aliaj prepariĝas al la tasko traduki ĝin helpe de la vortlisto.

### Aŭskulti kaj Imiti

Instruisto, al la lernantoj: Saluton!  
Lernantoj, ĥore aŭ laŭvice: Saluton!

Instruisto: Mi estas (nomo). Kiu estas mi? Mi estas (nomo).  
Instruisto, al najbara lernanto: Mi estas (nomo). Kiu estas vi?  
Lernantoj, ĉiu laŭvice demandas sian najbaron: Mi estas (nomo). Kiu estas vi?

Instruisto: Mi estas vir(in)o. Kio estas mi? Mi estas vir(in)o.  
Instruisto, al najbara lernanto: Mi estas vir(in)o. Kio estas vi?  
Lernantoj, ĉiu laŭvice demandas sian najbaron: Mi estas vir(in)o. Kio estas vi?

### Demandoj

La lernantoj provu respondi demandojn per plena frazo.

1. Kiu estas la plej bela virino en la tuta mondo? (Linda)
2. Kiu estas la plej malserioza knabo en la tuta universitato? (Tom)
3. Al kio iras Tom kun Linda? (al granda spegulo)
4. Kiu sidas en angulo en la universitata restoracio? (alta, blonda, juna viro)
5. Kiu iras al li? (bela knabino)

### MAL-

Kio estas la malo de

alta, kara, nova, plej, sola, verŝajne, granda, jes, ebla, sincera ?

La lernanto diru la serĉatan vorton esperante kaj provu traduki ĝin nacilingven. Atentigu viajn lernantojn pri tio ke mal- absolute ne enhavas iun signifon de negativ-eco. Ĝi estas nure logika prefikso, kiu transformas la post ĝi starantan radikon en sian malon.

## Konsilo pri -IN-

IN estas deviga sufikso nur por malmulte da porhomaj vortoj: la unuseksaj. \*

Li estas knabo.  
Ŝi estas knabino.

La plejmulto da porhomaj vortoj estas en sia baza formo ambaŭseksa:

-ano, -anto, -estro, -ido, -isto, -ulo, studento, amiko, ... . Por ili, IN estas nedevisa.

Li estas studento.  
Ŝi estas studento.  
Ŝi estas studentino.  
Ŝi estas strangulo.

Aplikindas la ora regulo pri afiksoj, NECESO KAJ SUFIĈO. Oni uzu afiksojn por sufiĉa klareco, sed ne pli ol necese.

Mi serĉas laboriston. (Mi serĉas inon aŭ viron)  
Mi serĉas korespondanton. (Mi serĉas inon aŭ viron)  
Mi serĉas amikon.  
Mi serĉas viran amikon.  
Mi serĉas amikinon.  
Ŝi estas mia plej bona amikino. (La plej bona el miaj inaj amikoj)  
Ŝi estas mia plej bona amiko. (La plej bona el ĉiuj miaj amikoj)

\* En GERDA aperas la jenaj unuseksaj vortoj: edzo (ĉap. 17), filo (18), frato (17), fraŭlo (12), ino (1), knabo (1), onklo (20), patro (14), sinjoro (10), viro (1)

## Konsilo pri LA

Pro sia artikolo, Esperanto estas ofte kritikata. Speciale komencantoj emas kritiki ĝin; depende de siaj gepatraj lingvoj, aŭ ili pensas ke ĝin devus sekvi nur ina substantivo, aŭ ke bezonatas nedifina artikolo ("unu" estas tiucele ofte fuŝe uzata), aŭ ili taksas artikolon tute nenecesa. Tamen, koncerne sian artikolon, Esperanto realigis bonan kompromison. Ĝi situas ie mezvoje inter lingvoj kun multe da artikoloj diversformaj, diversfunkciaj, kaj lingvoj senartikolaj.

La artikolo estas uzata, kiam oni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Lernantoj kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo, povas unuatempe tute ne uzi ĝin, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa.

## Ludo, Ekzerco

La grupo skribas ĉiujn vorterojn sur po unu karton. Oni miksas la kartojn kaj donas tri al ĉiu ludanto.

Ludvariantoj:

- ĉiu unuope elpensas frazon uzante la ricevitaĵajn kartojn
- la ludantoj kunlaboras en etaj grupoj kaj skribas siajn frazojn sur tabulon
- eta teksto fariĝas sur la tabulo tiel, ke laŭvice ĉiu ludanto aldonas vortojn, ĉiam uzante unu el siaj karto.

# ĉapitro 2

---

## Demandoj

1. Kio estas Linda? (studentino)
2. Kiun rigardas Tom kaj Linda? (junan, novan, strangan ulon kaj knabinon)
3. Kiu iras al la alta, blonda, juna viro? (knabino)
4. Kio estas en la mano de la blondulo? (io)
5. Kion vidas Tom kaj Linda plu? (mano proksimiĝas al la taso, revenas diskrete)
6. Ĉu estas io en la mano de la blondulo? (eble jes)
7. Ĉu io estas en la taso de la knabino? (eble jes)
8. Ĉu Tom nun laboras tro multe? (ne)
9. Ĉu Tom amas Lindan? (eble jes)
10. Ĉu ŝi amas lin? (eble ne)

## Demandoj ekster la teksto

Kio estas inter vi kaj mi?  
Kio estas malproksima?  
Kio estas proksima?

## Kio(n) - Kiu(n) - Tiu

1. Ki..... estas en la angulo? - la blondulo.
2. Ki..... estas en la angulo? - la tablo.
3. La blondulo, ki..... estas en la angulo, estas alta.
4. La tablo, ki..... estas en la angulo, estas malnova.
5. Ki..... tablo estas via? .....i..... en la angulo.
6. Ki..... vi demandas? Neni.....
7. Ki..... demandon vi havas? Neni.....
8. Ki..... vi amas? .....i..... fortulon.
9. Ki..... vi vidas? .....i..... tason.

Solvo:

1 Kiu, 2 Kio, 3 kiu, 4 kiu, 5 Kiu - Tiu, 6 Kion - Nenion, 7 Kiun - Neniun, 8 Kiun - Tiun  
9 Kion - Tiun

## Traduko

Li staras	mi vidas ŝin	li amas ŝin	tio estas simpla
Li stariĝas	mi vidiĝas	li enamiĝas	tio simpliĝas

## Frazoskeleto

La instruisto skribas sur tabulon frazoskeletonon, ekzemple:

La .....o .....as .....in .....i

Poste, uzante nur vortojn, kiujn la lernantoj jam renkontis en Gerda, li diras nacilingve:

La knabo petas min veni.

La tuta klaso ĥore ripetas tiun frazon, kompreneble en Esperanto.

Ripeto per aliaj frazoj:

La viro rigardas ŝin halti.

La maljunulo petas vin saluti.

La fortulo vidas vin sidi.

La studentino rigardas lin stariĝi.

La solulo petas ilin reveni.

.....

Necesas unue klarigi al la lernantoj, kial oni paroligas la klason ĥore, ke ne estas reveno al elementa lernejo, sed ke tio havas difinitan pedagogian sencon. Per tiu metodo, ĉiu devas diri la saman frazon, kaj la strukturoj enmensiĝas sen granda peno. Se iu eraras, lia voĉo perdiĝas en la grupa, kaj li ne hontas.

## Ĉu - Se

1. Mi ne povas vidi, ..... la junulo parolas al knabino aŭ ..... li nur rigardas al ŝi.
2. Vi vidas lin tute bone, ..... ne?
3. Turnu vin iomete, ..... vi volas.
4. .... li agas strange, li estas strangulo.
5. Mi alparolas ŝin, ..... ŝi rigardas al mi.
6. Mi ne scias, ..... mi alparolu ŝin aŭ ne.
7. .... ŝi reparolas al mi, ..... mi parolas al ŝi?
8. Li estas en universitato, ..... li estas studento.
9. Mi ne certas, ..... li estas studento. Li estas tro maljuna.

Solvo: 1. ĉu - ĉu; 2. ĉu; 3. se; 4. se; 5. se; 6. ĉu; 7. Ĉu - se (Se - ĉu); 8. se; 9. ĉu

## Ekzerco por la uzo de akuzativo

La kursgvidanto skribas sur la tabulon la komencon de frazo, al kiu ĉiu laŭvice devas aldoni komplementon unu post la alia, ripetante tiujn de la antaŭaj kunkonstruantoj. La kursgvidanto povas mem decidi ĉu helpi la memoron per skribado surtabulen de la aldonaĵoj. Se oni taksas tion taŭga oni povas peti unu el la lernantoj iri al la tabulo kaj skribi. La komenco de la frazo povas esti ekzemple:

Mi iras al la universitata restoracio kaj vidas ...

Rekomendata ludo: Romano (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 3

---

## Demandoj

1. Kiu venis al Tom kaj Linda? (Bob)
2. Kiel aspektas ili? (kiel spionoj)
3. Kion Bob demandis al ili? (ĉu mi povas sidi kun vi)
4. Ĉu ne gravas al Bob, ke Linda estas bela? (jes, sed io estas pli grava)
5. Kio estas pli grava? (vizaĝoj de Tom kaj Linda)
6. Kiel aspektas la vizaĝoj de Tom kaj Linda? (misteraj)

## Demandoj ekster la teksto

- Ĉu vi rigardas al la pordo?
- Ĉu mi estas pala?
- Ĉu la tablo estas bela?
- Ĉu vi estas spiono?
- Ĉu blondaj junuloj estas belaj?
- Ĉu vi estas studento?
- Ĉu vi estas blonda?
- Ĉu vi estas forta?
- Ĉu mi aspektas mistera?

## Konsilo pri Kio/Kiu

Lernantoj ofte malcertas pri la ĝusta uzo de "kio" kaj "kiu". Por certigi pri ties bona uzo en skribita frazo, oni povas utiligi la fakton, ke "kio" **neniam** havas j-finaĵon. Se oni uzis "kio" en frazo aŭ demando, kiu estus pluraligebla, tiam oni devas anstataŭi ĝin per "kiu", kaj inverse.

Ekzemploj:

"La tablo, kio staras en la angulo, estas nova." Malĝuste, ĉar la frazo pluraligeblas nur jene: "La tabloj, kiuj staras en la angulo(j), estas novaj."

"Kio estas en la angulo? - knabo kaj pordo." La subjekto en la demando estas tro nedifinita por pluraligo. "Kio" do ĝustas.

## Traduko

neebla malebla rigardebla videbla nevidebla revidi revidebla turni  
turnebla turnigi

## Akuzativo

1. Ili..... demandas mi..... .
2. Multo..... diras li..... al la studentoj.
3. Al la studentoj.... li.... demandas tio....., kio.... li.... ne scias, sed ili.... diras nenio.... .
4. Ili..... ne scias.
5. Linda..... ne sidas sola..... . Venas bela..... junulo..... .
6. Tio..... certe estas la universitato..... .
7. La studentoj..... montras al mi..... la studenta..... restoracio..... .
8. Mi..... petas vi..... , diru al mi..... tio..... .
9. La blondulo..... , kiu..... staras en la restoracio..... , estas stranga..... .
10. Ili..... ne pardonas la nova..... studento..... .
11. Li..... ne komprenas. Tio..... estas mistera..... .
12. Li..... preferas sinceraj..... junuloj..... .


Solvo:

1. Ili demandas min. 2. Multon diras li al la studentoj. 3. Al la studentoj li demandas tion, kion li ne scias, sed ili diras nenion. 4. Ili ne scias. 5. Linda ne sidas sola. Venas bela junulo. 6. Tio certe estas la universitato. 7. La studentoj montras al mi la studentan restoracion. 8. Mi petas vin, diru al mi tion. 9. La blondulo, kiu staras en la restoracio, estas stranga. 10. Ili ne pardonas la novan studenton. 11. Li ne komprenas. Tio estas mistera. 12. Li preferas sincerajn junulojn.

### Konsilo pri la akuzativo

Por ilustraj kaj klarigi la uzadon de l' akuzativo, kelkfoje helpas la bildo de SAGO. Ĝi havas pinton kaj pluman malantaŭon.

Malantaŭe staras aganto, ĉiam nominative. Ĝi direktas la sagon, kiu estas verbo, al la celo, la akuzativo. Alivorte, la -n staras pintodirekte. En difinitaj kazoj, ĝi povas anstataŭi prepozicion.



La sago aparte utilas por klarigi la uzon de la akuzativo indikanta direkton (ĉapitro 6).

Ne ĉiuj verboj rolas kiel sagoj; nur la t.n. "transiraj" (transitivaj). Pri transireco komparu kun la konsilo pri -it- en ĉapitro 9.

La -n donas al Esperanto klarecon kaj liberigas la vortordon en la frazo.

### Frazoskeleto-1

Komparu kun la samtitola ekzerco en ĉap. 2.


Ĉe la tabulo: Permesu, ke .....i .....u.

Frazoj: Permesu, ke mi parolu.  
Permesu, ke ŝi venu.  
Permesu, ke li plifortiĝu.  
Permesu, ke mi pliboniĝu.  
Permesu, ke li certiĝu.  
...

## Frazoskeleto 2

Tiun ĉi ekzercon indas fari antaŭ la ekzerco pri akuzativo ĉar temas pri la sama strukturo pli facile prezentita. Necesas unu paperfolio por ĉiu partoprenanto, dividita en kvar kolumnoj. Super la unua kolumno estu skribita subjekto, super la dua adverbo, poste verbo kaj laste komplemento. Ĉiu elpensu frazoparton por la unua kolumno, skribu ĝin kaj faldu tiun kolumnon malantaŭen por ke la skribaĵo ne estu legebla. Tiam oni pludonu la paperon al la dekstra aŭ maldekstra najbaro. Nun la tuto ripetigaĵas ĝis la frazo estas kompleta. Tiam oni lastfoje pludonu la paperon kaj ĉiu legu laŭte laŭvice la rezulton. La kursgvidanto povas antaŭe skribi la jam konatajn transirajn verbojn por faciligi la ekzercon: saluti, rigardi, direkti, montri, peti, turni, vidi, ami, esprimi, kompreni, pardoni, preferi.

## Komparativo, Superlativo



## Pluralo

Per la sekvaj elementoj la lernantoj konstruu frazojn uzante en ĉiu frazo minimume unufoje la adjektivon multa.

vidi - mi - studento  
rigardi - studento - blondulo  
ami - Bob - tiu blonda knabino  
saluti - maljunulo - ili  
montri - alia taso - Linda  
kompreni - Esperanto - alta viro  
revidi - bela studento - tiu stranga viro  
voli - kafo - nova studento  
peti - simpla spegulo - stranga virino

## El "Lasu min paroli plu!"

Du lernantoj (aŭ ĉiuj) hejme legu la rakonteton Nr. 3 (amdeklaro) el "Lasu min paroli plu!". Ili havas la taskon elekti kelkajn frazojn aŭ inventi novajn por fari etajn amdeklarojn unu al la alia antaŭ la klaso, dum la sekvonta renkontiĝo.

## Rekomendata ludo: Legomoj aŭ Fruktoj (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 4

---

## Demandoj

1. Kiu estas la nomo de la knabino ĉe la blondulo? (Gerda)
2. Kiam Tom kaj Linda sciis la nomon de Gerda? (kiam Bob diris)
3. Kion ŝi faras en la universitato? (instruas kriptajosciencon)
4. Kio estas Kriptografio? (arto kompreni, pri kio temas sekreta mesaĝo)
5. Kiu volis, ke ŝi instruu kriptografion? (Ronga)
6. Kiu estas Ronga? (profesoro pri lingvistiko)
7. Ĉu Gerda aŭ Linda estas pli bela? (Linda - por Bob)
8. Ĉu por Bob nur Linda estas la sola bela knabino? (ne, por Tom)
9. Ĉu Tom konsentas kun Bob? (ne)

## Demandoj ekster la teksto

Pri kio ni parolas?

Ĉu vi instruas?

Ĉu vi multe parolas pri sekretoj?

Ĉu vi parolas pri misteroj?

Ĉu vi estas profesoro?

## Traduko

bela - belaĵo forta - fortaĵo stranga - strangaĵo  
okazi - okazaĵo nova - novaĵo

## Pronomoj

Ĉiuj pronomoj estas nun konataj:

mi (ĉapitro 1), vi (1), ŝi (2), li(1), ĝi (3), oni (4), ni (2), vi (1), ili (2)

Per aldono de -n, -a, -an, -aj, -ajn eblas krei 45 vortojn. Malofte ankaŭ la -o utilas:  
La mio kaj la supermio (titolo de libro de Sigmund Freud)

1. Diru al mi..... li..... nomon. Ĉu Ronga? Li..... estas mistera.
2. En ni..... universitato oni..... vidas li..... nur kun virinoj.
3. Li..... estas profesoro lingvistika kaj li..... studentoj pleje estas inaj.
4. Ili..... instruas ankaŭ Gerda. Ŝi..... fako estas kriptografio.
5. Ni..... kunstudentoj ne scias, kio estas tio. Ĝi..... temas pri sekretaj lingvoj.
6. Oni..... lernas tiuj..... lingvojn..... por kompreni ili..... sekretajn mesagojn.
7. Iom scivoliĝis mi..... pri tiu scienco. Sed tiu Ronga: eble li..... volas ŝi..... pli ol ŝi..... sciencon.

Solvo:

1. Diru al mi lian nomon. Ĉu Ronga? Li estas mistera.
2. En nia universitato oni vidas lin nur kun virinoj.
3. Li estas profesoro lingvistika kaj liaj studentoj pleje estas inaj.
4. Ilin instruas ankaŭ Gerda. Ŝia fako estas kriptografio.
5. Niaj kunstudentoj ne scias, kio estas tio. Ĝi temas pri sekretaj lingvoj.
6. Oni lernas tiujn lingvojn por kompreni iliajn sekretajn mesagojn.
7. Iom scivoliĝis mi pri tiu scienco. Sed tiu Ronga: eble li volas ŝin pli ol ŝian sciencon.

Rekomendata ludo: Vortoĉenoj (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 5

---

## Demandoj

1. Kion la junulo verŝajne metis en la tason de Gerda? (iun drogon)
2. Kiam li metis ĝin en ŝian tason? (kiam ŝi rigardis for)
3. Kiel Tom povas scii ke li ne simple metis pecon da sukero en ŝian tason?  
(1. li ne agus tiel kaŝe; 2. tie estas nur pulvora sukero)
4. Ĉu Gerda reagas iel? (ekstaras, ekiras for)

## Unuaj tabelvortoj

Estas konataj jam (ĉapitroj interkrampe):

kio (1)	tio (3)	io (2)	nenio (1)
kiu (1)	tiu (1)	iu (5)	
	tie (5)		
kiel (3)	tiel (5)		
kiam (4)	tiam (5)	neniam (4)	
		iom (2)	

Ĉu la lernantoj divenos pluajn?

Utilas skribi la tabelvortojn, unu post la alia laŭ ĉapitro, en tabelon sur afiŝo fiksita al klasĉambra muro, por ke ĝi daŭre pretu helpi al la lernantoj. Modela tabelo troviĝas en la suplemento.

## -US

La sekvajn frazojn oni kompletigu per minimume tri dependaj frazoj:

Se mi estus profesoro ...  
Se mi estus Bob ...  
Se mi estus Linda ...  
Se mi estus studento ...  
Se mi estus vir(in)o ...  
...

## Se - Kiam

1. Mi ne scias, ..... ŝi venas al ni.
2. Mi tre multe laborus, ..... mi povus.
3. .... li venis al la universitato por instrui, la studentoj povas lerni ĉe li.
4. .... li venis al la universitato, li instruis lingvosciencan.
5. Mi volas paroli kun vi, ..... vi permesas.
6. Mi parolis kun ŝi, ..... ŝi sidis en la restoracio.

Solvo: 1. kiam; 2. se; 3. se; 4. kiam; 5. se; 6. kiam

## Vortkrea ekzerco

Konstruu kiel eble plej multajn vortojn per la sekvaj radikoj plus konataj afiksoj kaj aliaj finaĵoj kaj poste klarigu ilin:

vid-, instru-, simpl-, ver-.

Rekomendata ludo: Rakonteto (Plurakonto) (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 7

---

## Demandoj

1. Kion ekvidis Tom kaj Bob ĉe la angulo? (Gerdan)
2. Kio okazis al Gerda? (ŝi perdis la konscion kaj falis)
3. Ĉu Gerda perdis la vivon? (ne, ŝi perdis nur la konscion)
4. Kiel ni scias ke Gerda ne perdis la vivon? (ŝia koro batas)
5. Kio ŝajnas al Bob? (ŝajnas al li ke ŝi dormas)
6. Kion opinias Tom? (ke ili devas informi aŭtoritatojn)
7. Kiun la aŭtoritatoj eble decidos voki? (doktoron, kuraciston)
8. Kiel la knaboj metas Gerdan unue? (pli bone, pli komforte)
9. En kiun pozicion ili metas Gerdan? (metas piedojn pli altaj ol la kapo)
10. Kion Bob opinias pri tiu pozicio? (ke ĝi ne estas komforta)
11. Kiam tamen tiu estas la ĝusta pozicio? (kiam iu perdis la konscion)

## Verboj

Kunas nun la 6 verbaj finaĵoj:

-i (ĉap. 3) -u (1) -is (3) -as (1) -os (7) -us (5)

Ili estas tiom ofte uzataj ke indas desegni tabelon similan al tiu en la suplemento. Algluu ĝin al la muro por ke ĝi ĉiam pretu helpi. Unu post la alia, vi povas alskribi participojn al tiu tabelo.

## Kiel - Ol

1. Ĉu Tom estas same alta ..... Bob, aŭ ĉu li estas pli alta ..... Bob?
2. .... vi scias, Bob estas pli alta ..... Tom, sed malpli alta ..... la stranga blondulo.
3. Mi preferus resti ĉi tie ..... iri informi la aŭtoritatojn.
4. La vero ofte ŝajnas pli absurda ..... imagaĵoj.
5. Li iĝis pli kaj pli forta, li iĝis forta ..... fortulo.
6. Iru pli rapide, iru malpli rapide, iru ..... vi volas!

Solvo: 1 kiel - ol; 2 Kiel - ol - ol; 3 ol; 4 ol; 5 kiel; 6 kiel

Rekomendata ludo: Onklo Ludoviko ... (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 6

---

## Demandoj

1. Kion aŭdis Linda? (bruon)
2. Kion ŝi pensis pri la bruo? (kvazaŭ iu falis en la koridoro)
3. Kiel pensis Tom? (same)
4. Ĉu Tom havis la saman penson kiel Bob? (jes)
5. Kiam ili decidis iri vidi? (tuj)
6. Ĉu Linda iras kun Bob kaj Tom? (ne)
7. Kion devas observi Linda? (la junulon)
8. Kiun junulon devas observi Linda? (tiun kun kiu parolis Gerda)
9. Kion Linda diras al Bob kaj Tom? (ke ŝi iom timas)

## Akuzativo

1. La blondulo..... metis sukero..... en la taso..... da kafo..... .
2. Li..... iras en la restoracio..... , al la bela..... knabino..... , sed li..... falas en la koridoro..... .
3. Bob konsentas kun Linda..... .
4. Ili..... observas la studentoj..... .
5. Iu..... perdis aĵo..... en la restoracio..... .
6. Ili metas ĝi..... sur la tablo..... kaj decidas promeni en la ĝardeno..... ĉe la universitato..... . Ili..... ekiras.

Nova vorto: ĝardeno

Solvo:

1. La blondulo metis sukeron en la tason da kafo. 2. Li iras en la restoracion, al la bela knabino, sed li falas en la koridoro. 3. Bob konsentas kun Linda. 4. Ili observas la studentojn. 5. Iu perdis aĵon en la restoracio. 6. Ili metas ĝin sur la tablon kaj decidas promeni en la ĝardeno(n) ĉe la universitato. Ili ekiras.

## Traduko

Traduku la sekvan liston en la lingvon de la lernantoj. Ili retraduku Esperanten.

tie/ĉi tie    tiu tago/ĉi tiu tago    rigardi/forrigardi/rigardeti    vidi/ekvidi/revidi  
pali/paliĝi/paletiĝi    iri/foriri/ekiri    kafo/kafujo    rubo/rubujo

Nova vorto: rubo.

Rekomendata ludo: Litera salato (rigardu ĉapitron Ludoj)

## Konsilo pri SI

La refleksiva pronomo SI estas uzata nur por la triaj personoj, ekz.:

Mi kaŝas min  
Vi kaŝas vin  
Li kaŝas **sin**   Ŝi kaŝas **sin**   Ĝi kaŝas **sin**   Oni kaŝas **sin**  
Ni kaŝas nin  
Vi kaŝas vin  
Ili kaŝas **sin**

## SI

1. Mi konas sin/min. 2. Mi do ne volas vidi min/sin en la spegulo. 3. Petro estas pli bela ol mi, kaj mi ofte vidas lin rigardi lin/sin en la spegulo. 4. Kiam li turnas lin/sin al mi, mi plene vidas sian/lian belan aspekton.

5. Vi volas piediri reen al sia/via ĉambro? 6. Vi promenos longe, sed ne timu ke siaj/viaj kruroj tro laboros kaj perdos ilian/sian tutan forton.

7. Ĉu vi havas informojn pri Ana? 8. Ŝi kuŝis en .... (ŝi.../si...) ĉambro kaj ne sentis .... (si.../ŝi...) tre bone. 9. Tom iris al .... (ŝi.../si...) kun .... (li.../si...) kuracisto, sed ŝi ne rigardis tiun kuraciston serioza. 10. Ŝi preferas .... (si.../ŝi...) kuraciston, ŝi vere ne amas .... (li.../si...). 11. Li do forsendis .... (li.../si...) kaj vokis .... (si.../ŝi...). 12. Strange, kiam ŝi vidis .... (si.../li...) kuraciston, ŝi sentis .... (si.../ŝi...) malbone, sed tuj kiam ŝi vidis .... (ŝi.../si...) kuraciston alveni, ŝi jam sentis .... (ŝi.../si...) pli bone. 13. Oni .... (oni.../si...) demandas, ĉu ŝi ametas .... (li.../ŝi.../si...) kuraciston.

Solvo:

1. Mi konas min. 2. Mi do ne volas vidi min en la spegulo. 3. Petro estas pli bela ol mi, kaj mi ofte vidas lin rigardi sin en la spegulo. 4. Kiam li turnas sin al mi, mi plene vidas lian belan aspekton.

5. Vi volas piediri reen al via ĉambro? 6. Vi promenos longe, sed ne timu ke viaj kruroj tro laboros kaj perdos sian tutan forton.

7. Ĉu vi havas informojn pri Ana? 8. Ŝi kuŝis en sia ĉambro kaj ne sentis sin tre bone. 9. Tom iris al ŝi kun sia kuracisto, sed ŝi ne rigardis tiun kuraciston serioza. 10. Ŝi preferas sian kuraciston, ŝi vere ne amas lian. 11. Li do forsendis sian kaj vokis ŝian. 12. Strange, kiam ŝi vidis lian kuraciston, ŝi sentis sin malbone, sed tuj kiam ŝi vidis sian kuraciston alveni, ŝi jam sentis sin pli bone. 13. Oni sin demandas, ĉu ŝi ametas sian kuraciston.

Rekomendata ludo: Ĉena rakonto (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 8

---

## Demandoj

1. Kion Linda observas en la universitata memserva restoracio? (la junulon)
2. Pri kiu pli kaj pli maltrankviliĝas Linda? (pri Tom, Bob kaj Gerda)
3. Kion volus ŝi? (ke Tom kaj Bob estu kun ŝi)
4. Kiel Tom kaj Bob povus helpi al ŝi? (ili povus helpi ŝin decidi)
5. Kiam la juna viro ekstaras? (antaŭ ol Linda povas decidi)
6. Al kiu direkto iras la juna viro? (al la pordo / al la urbo)
7. Ĉu Linda reagis? (jes)
8. Kiel ŝi reagis? (aŭtomate)

## Ĉu tio veras?

1. En la universitata memserva restoracio Linda sidas kaj pensas.
2. Ŝi pensas tre trankvile kaj ŝiaj pensoj iĝas pli kaj pli trankvilaj.
3. Ŝi observas la junan viron, kiu metis ion en la kafon de Gerda.
4. Tom kaj Bob estas ne longe for.
5. Linda scias, ke ŝi sekvos la junulon.
6. Estas jam vespero, sed baldaŭ ne venos nokto.
7. Linda pensas, ke ŝi atendos en la koridoro.
8. Linda sukcesis decidi, kion ŝi faru.
9. Ŝia koro batas rapide.
10. Kaj jen, antaŭ ol Linda povas decidi, la juna viro ekstaras.
11. Li rigardas al Linda.
12. Kaj ŝi aŭtomate ekstaras kaj ekpaŝas al la sama pordo.
13. Tamen Linda ne sekvas la junulon.

## Solvo:

1 jes; 2 ne; 3 jes; 4 ne; 5 ne; 6 ne; 7 jes; 8 ne; 9 jes; 10 jes; 11 ne;  
12 jes; 13 ne

## Akuzativo

1. La sukerpeco..... falis en la kafo..... .
2. Sed mi..... ne deziras sukero..... en mia kafo..... .
3. Lakto..... mi..... preferas.
4. Rigardu, Linda..... venas en la restoracio..... .
5. Eble ŝi..... deziras kafo..... kun sukero..... .
6. Ni..... kaŝu la drogo..... en la poŝo..... .
7. Atentu! La lakto..... falas sur la tablo..... .
8. Sekvu la studentoj..... ĉi tiu..... tago..... .
9. Ili..... iras al la urbo.
10. La posta..... tago..... mi..... atendis ŝi..... en la restoracio..... .

Nova vorto: Lakto (ĉap. 21)

## Solvo:

1. La sukerpeco falis en la kafon. 2. Sed mi ne deziras sukeron en mia kafo. 3. Lakton mi preferas. 4. Rigardu, Linda venas en la restoracion. 5. Eble ŝi deziras kafon kun sukero. 6. Ni kaŝu la drogon en la poŝo. 7. Atentu! La lakto falas sur la tablon. 8. Sekvu la studentojn ĉi tiun tagon. 9. Ili iras al la urbo. 10. La postan tagon mi atendis ŝin en la restoracio.

# ĉapitro 9

## Demandoj

1. Kiun aspekton havas la flegistino? (dika, grasa virino kun bluaj okuloj, ruĝaj haroj kaj ronda vizaĝo)
2. Kiu vorto ŝajne ne ekzistas en ŝia vortaro? (la vorto "urĝa")
3. Kie svenis Gerda? (meze de la koridoro)
4. Kie oni svenas en ĉi tiu universitato? (en restoracio, klas-, dorm-, banĉambroj)
5. Kial maltrankviliĝas Tom? (ĉar la flegistino paroladas kaj neniu zorgas pri Gerda)
6. Kial ekhaltis Tom, kiam li revenis kun la flegistino? (ĉar Linda ne estis plu tie)
7. Kio okazis al Bob? (fal-sidis ĉe la koridora muro, senkonscie, batite)
8. Kiel sentas sin Tom? (pli kaj pli maltrankviliĝas)

## Konsilo pri -IT- (pasivo)

Por klarigi la uzadon de la pasivo necesas enkonduki la distingon inter transiraj (transitivaj) kaj netransiraj (netransitivaj) verboj.

Transiraj verboj esprimas agojn kiuj celas aŭ koncernas personon aŭ aferon, kiun oni devas nomi, se oni volas precizigi la sencon de frazo.

Mi vidis lin

Kiun li batis?

Ili transirigas sian agon sur iun aŭ ion.

## Netransiraj estas verboj

- aŭ esprimantaj agojn kiuj estas direktataj al neniu aŭ nenio:

*Li ekstaris kaj foriris*

- aŭ tute ne esprimantaj agojn:

*Li sidas en la angulo*

*Ŝi estas bela*

*Li aspektas forta*

## Nur transiraj verboj havas pasivon.

*Mi vidis lin - Li estas vidita de mi      Kiun li batis? - Kiu estas batita de li?*

Sed ne: *li estas ekstarita      li estas sidita*

## -ITA

Elektu kelkajn verbojn el la sekva listo aŭ disdividu la verbojn inter la lernantoj. Ili eltrovu, kiuj verboj rajtas akcepti la -ita-finaĵon. Tiucele, ili unue faros simplan frazon kaj poste provos enmeti -ita.

agi ami aŭdi bani bati decidi demandi devi deziri diri diskuti dormi ekzisti fali fari flegi gravi halti helpi imagi informi instrui kompati kompreni koni konscii konsenti kuŝi labori lasi lerni memori meti okazi okupi okupiĝi opinii paroli paŝi perdi permesi peti povi pravi promeni provi resti rigardi riski saluti scii sekvi sendi senti servi sidi stari sukcesi suspekti sveni ŝajni temi trovi turni tuŝi veni vidi vivi voki voli zorgi

Solvo: (grasaj verboj akceptas la -ita-finaĵon)

agi ami aŭdi bani bati decidi demandi devi deziri diri diskuti dormi ekzisti  
fali fari flegi gravi halti helpi imagi informi instrui kompati kompreni koni  
konscii konsenti kuŝi labori lasi lerni memori meti okazi okupi okupiĝi opinii  
paroli paŝi perdi permesi peti povi pravi promeni provi resti rigardi riski saluti  
scii sekvi sendi senti servi sidi stari sukcesi suspekti sveni ŝajni temi trovi  
turni tuŝi veni vidi vivi voki voli zorgi

### Demandovortoj

Estas konataj ĝis nun la jenaj demandovortoj (ĉapitronombro interkrampe):

Kio (1), Kion (2), Kiu (1), Kiun (2), Kiel (3), Kiam (4), Kial (9), Kie (9), Kien (9), Ĉu (2)

Enmetu la ĝustan demandovorton:

1. .... diris la kuracisto? - La kuracisto diris: "Restu senzorga, nenio malbonas".
2. .... vi resaniĝos? - Mi resaniĝos baldaŭ.
3. .... vi iros unue post la resaniĝo? - Unue mi iros en bonan restoracion.
4. .... vi iros sola? - Ne, amikoj iros kun mi.
5. .... okupiĝas pri vi dum la malsano? - Plejofte Anjo kaj Pablo okupiĝas pri mi.
6. .... estas via patrino? - En ŝia oficejo; ŝi devas multe labori tie.
7. .... vi devas ne iri piede? - Ĉar mia kruro malsanis, senfortas.
8. .... vi ekmalsanis? - Mi ekmalsanis subite kaj forte.
9. .... tio okazis? - Tio okazis en mia laborejo.
10. .... ili metis sur vian laborlokon? - Neniun, la laboro atendas min, ĝi restas ne-  
farita.
11. .... ili metis neniun? - Ĉar laboristoj estas malsimple troveblaj por mia laboro.

Solvo:

1 Kion, 2 Kiam, 3 Kien, 4 Ĉu, 5 Kiu, 6 Kie, 7 Kial, 8 Kiel, 9 Kie, 10 Kiun, 11 Kial

Rekomendata ludo: Manĝigo de rabobestoj (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 10

---

## Demandoj

1. Kial Tom ne emas fidi la flegistinon? (ŝi estas tro parolema)
2. Kiam amikiĝis Tom kaj Bob? (antaŭ longe)
3. Kie amikiĝis ili? (en la urbego, kie ili vivis tiutempe)
4. Kion ŝatas ambaŭ amikoj? (bonegan vivon, timemajn studentinojn)
5. Kion Tom pensas pri la flegistino? (ne fidinda, ne zorgema, ne atentema)
6. Ĉu estas aliaj flegistinoj en la universitato? (ne)
7. Kion li demandas sin pri Linda? (ĉu ŝi ne troviĝas en danĝero)
8. Kial li sentas sin ema zorgi pri ŝi? (li amegas ŝin)

## Resumo de la ĉapitroj 1 ĝis 10

Ordigu la frazojn al rerakonto de la ĝisnuna historio; plenumu la truojn, kie necesas. Kelkfoje ekzistas pli ol unu solvo.

- Ronga, la profesoro pri lingvistiko, volis ke ŝi ven..... al la universitato ..... instru..... kaj labor..... kun li.  
Kiam ili aŭdas ŝi..... falbruon el la koridor....., Bob kaj Tom rapidas por helpi ŝi..... . Bob metas ŝin bone, tiel ..... ŝi kuŝu komforte, kaj Tom ir..... vok..... flegistinon.
- Ŝi observ..... lin kaj kiam li eliras tra la pordo alurb....., ŝi..... sekvas li..... . Linda estas junulino iom tim....., certe belega. Tom am.....as ŝin, li havas okulojn nur ..... ŝi.
- Li povas rakont..... al ili....., ki..... estas la knabino: ŝi estas Gerda, nova instruist..... pri kriptaŝscienco (.....novaj sekretaj lingvoj).
- Tom kaj Linda estas student..... . En universitat..... restoraci....., ili observas blond..... junul....., kiu agas plej strange: dum li parolas ..... knabino, li kaŝ..... metas io..... en ŝi..... kafotaso..... .
- Li zorgas pri ŝi. Ĉu ŝi trov..... en danĝero? Ki....., fakte, ŝi iros? Kaj Gerda, kien ŝi..... foriĝis? Ki..... okaz..... kun ŝi, kion ..... volas ke ŝi far..... ?  
Jen demand..... respondind..... . ..... vi scivoliĝis? Do, ..... ek..... al la .....laborado !
- Eble estis drogo, ĉar tuj post ki..... ŝi ekstaras kaj forlasas la restoracio....., ..... la koridoro..... ŝi jam perdas la konscion.  
Intertemp....., Bob sid.....is ĉe Tom kaj Linda.
- Kiam Tom fine .....venas kun la flegistino, Gerda estas for, kaj Bob fal-sidas ĉe la koridor..... mur....., bat.....a surkape.  
Kion .....tempe faras Linda? Ŝi pli kaj pli .....trankvil....., lasite sola ..... la universitata restoracio kun la blond..... strang..... .
- Tiu flegistino, dika, grasa kaj parolema, nur post long..... diskut..... kun Tom konsciiĝas ..... tio, ke la afero urĝas. Se ŝi est..... pli zorgema, ŝi ..... rapidus kaj eble ne okazus la jeno:

Solvo:

Tom kaj Linda estas studentoj. En universitata restoracio, ili observas blondan junulon, kiu agas plej strange: dum li parolas al/kun knabino, li kaŝe metas ion en ŝian kafotason.

Eble estis drogo, ĉar tuj post kiam ŝi ekstaras kaj forlasas la restoracion, en la koridoro ŝi jam perdas la konscion. Intertempe, Bob sidiĝis ĉe Tom kaj Linda.

Li povas rakonti al ili, kiu estas la knabino: ŝi estas Gerda, nova instruisto/ino pri kriptaĵoscienco (malnovaj sekretaj lingvoj).

Ronga, la profesoro pri lingvistiko, volis ke ŝi venu al la universitato por instrui kaj labori kun li.

Kiam ili aŭdas ŝian falbruon el la koridoro, Bob kaj Tom rapidas por helpi ŝin. Bob metas ŝin bone, tiel ke ŝi kuŝu komforte, kaj Tom iras voki flegistinon.

Tiu flegistino, dika, grasa kaj parolema, nur post longa/aj diskuto/oj kun Tom konsciiĝas pri tio, ke la afero urĝas. Se ŝi estus pli zorgema, ŝi pli rapidus kaj eble ne okazus la jeno:

Kiam Tom fine al/revenas kun la flegistino, Gerda estas for, kaj Bob falsidas ĉe la koridora muro, batita surkape.

Kion inter/sam/dumtempe faras Linda? Ŝi pli kaj pli maltrankviliĝas, lasite sola en la universitata restoracio kun la blonda/ulo strangulo/a.

Ŝi observas lin kaj kiam li eliras tra la pordo alurba/en, ŝi sekvas lin.

Linda estas junulino iom timema, certe belega. Tom amegas ŝin, li havas okulojn nur por ŝi.

Li zorgas pri ŝi. Ĉu ŝi troviĝas en danĝero? Kien, fakte, ŝi iros? Kaj Gerda, kien ŝi foriĝis? Kio okazis/as/os kun ŝi, kion iu/oni volas ke ŝi faru? Jen demando/oj respondinda/aj. Ĉu vi scivoliĝis? Do, ni/vi eku al la plu/kunlaborado !

### Afiksripeta ekzerco

Ĉiu lernanto ricevu unu radikon per kiu kun la helpo de la konataj afiksoj kaj aliaj finaĵoj oni konstruu kiel eble plej multajn vortojn dum limigita tempo (ekzemple kvaronhoro). Poste ĉiu legu kaj klarigu siajn rezultojn. Eblaj radikoj povas esti:

alt-, amik-, dank-, facil-, fal-, help-, inform-.

### Ami - Deziri - Emi - Ŝati - Voli

Ĉiuj ĉi kvin vortoj nun estas enkondukitaj en la vortprovizon de la lernanto. Komentoj kaj eĉ progresintoj foje uzas ilin mise kaj interŝange. Por ekzerci ilin, laboru per la sekvaj frazoj aŭ elpensu kromajn. Ĉu oni povas anstataŭigi la uzitajn verbojn per aliaj el la kvinopoj? Kiel tio ŝanĝus la signifon de la frazoj?

Bob ŝatas la bonegan vivon en sia urbo.

Tom ne emas fidi la flegistinon.

Li volas, ke ŝi rigardu al lia direkto, sed ŝi tute ne emas rigardi lin.

Mi ŝatas kafon. Fakte, mi deziras tason da kafo nun.

Tom ŝategas Lindan, li verŝajne eĉ amas ŝin.

Rekomendata ludo: Rapidaj pentristoj (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 11

---

## Demandoj

1. Kiun aliris kaj alparolis Linda? (la junan blondan viron)
2. Kiel aspektis la vizaĝo de la juna blonda viro? (ŝajne ne tre kontenta)
3. Kien devis urĝe veturi la junulo? (al la urbo)
4. Ĉu Linda petis lin ripari ŝian veturilon? (ne, ŝi petis akcepti ŝin en lia aŭto)
5. Ĝis kie ŝi volis kunveturi? (ĝis la urbo)
6. Pri kio parolas Linda veturante? (pri aŭtoj)
7. Kiel respondas la junulo? (li ne respondas, nur silentas)
8. Kial la junulo estas silentema? (li havas zorgojn)

## Demandoj ekster la teksto

- Ĉu vi foje kaŝe observis aŭ sekvis homon?  
Kiam tio okazis? Kial?  
Kiu diraĵo plej bone funkcias por paroligi iun homon, kiun vi ne konas?  
Ĉu vi veturigis Lindan en tia okazo?  
Ĉu entute vi veturigis en via aŭto homon, kiun vi ne konas?  
Ĉu vi kuraĝus diri la malveron kiel Linda?

## Trovu la ĝustan frazofinon

(kompreneble neuzante la lernolibron)

1. Linda aliris la junulon kaj alparolis .....
2. Li turnis sin al ŝi, kun .....
3. Li fine demandis: .....
4. Kaj tuj li aldonis: "Bonvolu ....."
5. Mi urĝe devas .....
6. Ĉiam mi miras vidi, ke .....
7. "Vi min miskomprenis, mi ....."
8. Sekvi lin estus danĝere, sed se li veturas ....
9. Kaj li malfermas la .....
10. "Dankon, vi vere estas ....."
11. "Ne dankinde", li .....
12. "Mi ne ŝatas la ideon, ke mi devos ....."
13. Mi havas veturilon, sed .....
14. Ne estas facile igi .....
15. Ŝi forte deziras lin paroligi, sed ŝi .....
16. "Mi ne volas ĝeni vin. Estas jam ....."
  - a. pardon de la aŭto por ŝi.
  - b. mi ne ŝatas aŭtojn."
  - c. pardoni min, se mi respondas nee, sed al mi vere mankas tempo.
    - ĉ. "Kiel mi povus vin helpi?"
    - d. tiel bonkore, ke vi veturigas min."
    - e. lin: "Sinjoro, ĉu vi bonvolus helpi al mi?"
      - f. veturiloj entute funkcias."
      - g. lin diri ion, pensas Linda.
      - ĝ. aŭte, mi petos lin akcepti min, kaj mi igos lin paroli.
        - h. tre afabla. Mi plej sincere dankas."
        - ĥ. veturi al la urbo.
        - i. timas samtempe malkontentigi lin.
        - j. vizaĝo ne tre kontenta.
        - ĵ. ne petas vin ripari mian veturilon."
        - k. venigi ripariston, mekanikiston.
          - l. respondas iom seke.

Solvo: 1e, 2j, 3ĉ, 4c, 5ĥ, 6f, 7ĵ, 8ĝ, 9a, 10h, 11l, 12k, 13b, 14g, 15i, 16d

### Konsilo pri IG/IĜ

La trafa uzado de -ig- kaj -iĝ- estas en la simpla gramatiko de Esperanto ero plej malsimpla. Ne estas mirinde do, se viaj lernantoj nur iom post iom progresos. Utilas unue konsciiĝi pri tio ke verbo finiĝanta per

-iĝ- estas ĉiam netransira

-ig- estas ĉiam transira.

(Komparu kun konsilo pri -ita en ĉapitro 9)

Li staras ie. (netrans.) ⇨ Mi starigas lin. (trans.)

Mi informas lin (trans.) ⇨ Li informiĝas pri motoroj (netrans.)

**IG/IĜ** do estas utilaj por transformi verbon al dezirata funkcio en frazo. **IG** tiurilate similas al aliaj vorteroj, kiuj kapablas transformi verbon netransiran al transira stato: la vorteroj "al-", "el-", "fin-" kaj "pri-".

Li laboras en la oficejo. ⇨ Tie li prilaboras banalaĵojn.

Se -iĝ- estas ligata kun verbo netransira, ĝi restas netransira, sed akiras la signifon de evoluo, moviĝo al iu stato:

Li staras ie. Malrapide, li stariĝas. Mia aŭto haltas antaŭ la oficejo. Mia aŭto haltiĝis subite.

Se -ig- estas ligata kun verbo transira, ĝi restas tia, sed ĝi akiras la signifon ke alia subjekto transprenas la agon:

Mi informas lin. Mi informigas lin. (= mi igas iun informi lin; ne mi informas, sed iu alia)

Mi flegas ŝin. Mi flegigas ŝin en malsanulejo. (= flegistoj flegas ŝin, ne mi)

### IG - IĜ

Enmetu aŭ -ig- aŭ -iĝ-

Mi volis aspekti pli bela ol normale. Mi .....is<sup>1</sup> min pli bela antaŭ la promenado. Antaŭ la promenado, mi .....is<sup>2</sup> pli bela. Penjo ridis pri mi, ĉar mi plibel.....is<sup>3</sup> min. Ni veturis en la urbon. Vetur.....is<sup>4</sup> nin Penjo. Ŝi .....is<sup>5</sup> mia amiko tuj post mia unua tago en la laborejo. Antaŭ la forveturo, ŝi trovis min en mia ĉambro, kie mi plibel.....is<sup>6</sup>.

La urbo trov.....as<sup>7</sup> tro malproksime de nia laborejo por iri piede. Penjo ne havas aŭton, sed ŝi sukcesis hav.....i<sup>8</sup> al si la aŭton de Bob.

Post longa promenado en la urbo, ni volis eksidi en trinkejo. Tuj post kiam ni sid.....is<sup>9</sup> ĉe tablo, iu ulo turnis sin. Li turn.....is<sup>10</sup> al ni kaj ekrigardis nin. Ni eksentis nin malbonaj. Lia rigardado malbonsent.....is<sup>11</sup> nin. Ni devis agi. Ni ne plu restis sidaj, ni restar.....is<sup>12</sup>, tiel dev.....ante<sup>13</sup> lin forturni sin. Li komprenis ke li ĝenis nin ade rigardante al ni. Ni kompren.....is<sup>14</sup> al li ke rigardado povas esti maldiskreta.

Mi lernas multon en la urbo. Ĝi lern.....as<sup>15</sup> min pri la vivo. Multhoma kunvivado lern.....as<sup>16</sup> kvazaŭ aŭtomate en la urbo.

Solvo: 1ig 2iĝ 3ig 4ig 5iĝ 6iĝ 7iĝ 8ig 9iĝ 10iĝ 11ig 12iĝ 13ig 14ig 15ig 16iĝ

Traduko

unuiĝi, reunuigo, reunuiĝo, kontentige, silentigi, urbiĝo, sanigo, saniĝi, senigi, konsciiĝi, konsciigi, vesperiĝas, doktoriĝo, devigi, evidentiĝas, tagiĝo, renovigo, malpliigo, ...

Rekomendata ludo: Ĉu-ludo (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 12

---

## Demandoj

1. Kion faras Bob?  
(duone malfermas la okulojn, poste fermas ilin, finfine malfermas ilin tute larĝe)
2. Pri kio parolas Tom, Bob kaj la flegistino?  
(Bob petas ion por trinki, flegistino demandas kiel li sentas sin. Tom petas ke ŝi alportu glason da brando)
3. Kial Bob petas alporti al li ion por trinki?  
(li tre soifas)
4. Kion diras la flegistino en sia ĉambro?  
(ke Bob povas trinki tiom da akvo, kiom li deziras)
5. Tom petas Bob klarigi kio okazis. Kion respondas Bob?  
(li ne povas klarigi, ĉar nenio estas klara)

## Kunigo

Trovu por ĉiu maldekstra vorto similsignifan vorton el la dekstra kolumno.

- |                |              |
|----------------|--------------|
| 1. okulo       | a. nesufiĉe  |
| 2. proksima    | b. demandi   |
| 3. montri      | c. malmontri |
| 4. maltro      | ĉ. vidilo    |
| 5. sen         | d. loko      |
| 6. homo        | e. tre       |
| 7. malrespondi | f. deziri    |
| 8. el          | g. sidilo    |
| 9. ege         | ĝ. malfora   |
| 10. malne      | h. ulo       |
| 11. seĝo       | ĥ. jes       |
| 12. emi        | i. malkun    |
| 13. ejo        | j. vidigi    |
| 14. kaŝi       | ĵ. malen     |

Solvo:

1ĉ, 2ĝ, 3j, 4a, 5i, 6h, 7b, 8ĵ, 9e, 10ĥ, 11g, 12f, 13d, 14c

## El "Lasu min paroli plu!"

Du lernantoj hejme legu la rakonteton nr. 12 (Jen vi ree trinkas!). Dum la sekvonta renkontiĝo en la klaso unu provas konvinki la alian ke tiu ĉesu la trinkadon, la alia provu sin defendi. Se ambaŭ hejme kunlaboras, eblas ankaŭ prepari skeĉon (amuzan teatraĵeton).

Rekomendata ludo: Aranea reto (rigardu ĉapitron Ludoj)

## Novaj vortoj (ĉapitro)

amuzo	ĉasi	kajto	minaco	teksto (25)
armilo	ĉielo	koloro (16)	muziko (16)	tero (22)
aviadilo (22)	ĉiu (20)	konstrui	paco	vento
birdo	fero	ligno	papero (15)	
cent (15)	hejmo (18)	milito (16)	ŝnuro	

## Liber-

Tradukigu el Esperanto aŭ, prefere, en Esperanton:

liberigi libereco libertempo malliberigita liberigebla liberpensulo  
liberiganto liberama malliberejo malliberulo.

Rekomendata ludo: Bildtitoloj (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 15

---

## Demandoj

1. Pri kio parolas Tom kaj Linda? (Tom petas, ke ŝi rakontu/raportu kio okazis dum ŝi observis la junulon, kaj Linda rakontas pri tio)
2. Kiu estas Tom? (studento en la universitato kaj amiko de Bob kaj Linda)
3. Kion rakontas Linda al Tom? (kiel ŝi plenumis la taskon kaj observis la junulon)
4. Kio okazis al la junulo kiam Linda forlasis la aŭton? (ŝi tute bonŝance ekvidis la junulon elirantan el la poŝtoŝtanco kaj poste li eniris la panejon)
5. Kiom da malsamaj specoj da pano vendas la magazeno? (40, kaj ĉiaspecajn ĉokoladojn)
6. Kion portis la junulo forirante el la magazeno? (plenplenan paperan sakon)
7. Kial Linda ofte irus magazinon kaj aĉetus multon? (ŝi ŝatas ĉokoladon kaj dolĉaĵojn)
8. Kial ŝi ne faras tion? (timas dikiĝi)

## Vortoj nur el afiksoj

Traduku nacilingven. La lernantoj retraduku esperanten.

ino eki ujo iĝi ulo ree eco la malo ege ete emi indi ejo aĵo  
male inaĵo ebligi arigi etaĵo ariĝi malebla ilarujo ekemi ebleco

## El "Lasu min paroli plu!"

Kiel hejmtasko por la sekvonta renkontiĝo, la lernantoj legu la rakonteton 15a (Mistero en papervendejo) el la akompana libro "Lasu min paroli plu!". Iuj poste provu rerakonti la krimon.

Rekomendata ludo: Kiu havas plej multajn nomojn (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 14

## Demandoj

1. Bonvolu rakonti kiel Linda sentis sin kiam ŝi vekigis? (laca, mankas forto, tuta korpo doloras, malĝoja)
2. Kiel aspektis la ĉambro? (malbela, ne tre pura, tablo kaj seĝo staras apud la muro)
3. Kion Gerda pensas pri la plezuro esti libera? (io perfekte natura. Antaŭe ŝi neniam pensis pri la plezuro esti libera. Libereco ŝajnis evidenta rajto)
4. Kiel provas Gerda liberiĝi? (batas la pordon kun plej granda forto. Krias, piedbatas la pordon)
5. Kio vekis ŝin (Gerdan)? (infana voĉo)
6. Pri kio parolis la infanoj? (ili decidis ne diri al la gepatroj, ke ili venis en la forlasitan domon)
7. Ĉu la reago de la infanoj estis kuraĝa? (ne. Ili timis kaj ne helpis al Gerda liberiĝi)

## Kanto

Eblas aŭskulti, legi, traduki, kanti ĝin. La grupo Kajto produktis sur kasedo kaj kompaktdisko kanton instruocle bone uzeblan.

MI MEMORAS (teksto: J. Duijs; muziko: Kajto)

1  
Mi memoras  
ke mi atendis kiel knabo  
la revenon hejmen de mia patro  
por labori kun plezuro  
aĉetis mi paperon, lignon kaj la ŝnuron  
por fari kajton.

3  
Mi memoras  
ke la ĉielo estis plena  
de multaj kajtoj tutkoloraj  
ke centoj da infanoj kune ludis  
kaj tutajn tagojn ege sin amuzis  
per sia kajto

5  
Mi memoras  
ke bruaj feraj birdoj  
mortigis nian tutan ĝojon  
timigaj militaj ĉas-aviadiloj  
estis ĝenataj de infanaj amuziloj  
niaj kajtoj

Se kajto estas tiel minaca  
ĝi servu kiel armilo paca

2  
Mi memoras  
ke mi konstruis kiel knabo  
tre belan kajton kun mia patro  
mi rigardis lin kun varma sento  
li ĝoje kriis kiam venis bona vento  
por nia kajto

4  
Mi memoras  
ke mi ne komprenis kiel knabo  
ke ne plu vidiĝis iun tagon  
paperaj birdoj memfaritaj  
ni restis hejme tute surprizitaj  
kun nia kajto

6  
Do mi petas  
al ĉiuj infanoj de la tero  
fari multajn birdojn el papero  
por forpeli aermilitilojn  
ni kovru la ĉielon per pacarmiloj  
niaj kajtoj



# ĉapitro 13

---

## Demandoj

1. Kiuj pensoj venas al Linda laŭvoje? (ŝi deziras ricevi informojn pri la kunulo. Ŝi ne ŝatas silentadon. Ŝi pensas, ke ŝi rekomencos paroli)
2. Kiel reagis la junulo, kiam Linda provis paroligi lin? (al li ŝajnas, ke Linda estas scivolema. Li diras, ke li ne povas klarigi siajn zorgojn al ŝi)
3. Kiel Linda klarigas sian scivolon? (trovis la silentadon peza, vojon pli kaj pli longa)
4. Kial la junulo forgesis pri Linda? (absorbata de siaj pensoj, zorgoj kaj la vojo)
5. Kion Linda rakontis pri siaj pensoj al la junulo?(pensis pri li, ĉar li ŝajnis malfeliĉa)
6. Ĉu vere Linda volis helpi al la juna viro? (ne. Ŝi volis paroligi lin, ricevi informojn)
7. Ĉu li akceptas la proponon de Linda? (ne)
8. Pri kio pensas Linda vidante la forveturantan aŭton? (ke la junulo verŝajne suspektis ŝin)

## Traduko

La instruisto traduku la sekvan vortliston en la nacilingvo(j)n de la lernantoj kaj retradukigu ĝin esperanten.

maljunege malofte malfermi blondulo devigi ridinde novaĵo pordeto fermilo portisto malrapidigo helpilo decidema novulo aminda manĝejo finaĵo veturilo homaro montrilo zorgeme urbiĝo enhavo rapidigi ekveturi instruisto miskompreni junularo malseketa ridigisto sensoifigilo.

## Ekzerco

Verku teksteton pri la temo: "Kio okazis al Gerda?"

Rekomendata ludo: Babilona salato (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 16

---

## Demandoj

1. Kion faris la junulo, kiam li eliris el tiu vendejo?  
(Li portis la sakon al la aŭto, metis ĝin en ĝi kaj plu piediris)
2. Kien subite li eniris? (Subite li eniris restoracion)
3. Kial Linda hezitis? (Ŝi timis, ke li vidus kaj rekonos ŝin)
4. Kiel aspektis la restoracio? (turka aŭ pseŭdoturka restoracio. kelneroj kun strangaj vestaĵoj, muziko stranga)
5. Kiujn manĝaĵojn manĝis Linda? (Bonegan supon, tre bonan salaton, kukon kaj ankaŭ trinkis kafon)
6. Kion faris la soldatoj en la restoracio? (Kriegis, kriaĉis, faris bruegon kaj batis unu la alian)
7. Kia estas Linda? (Bela, kuraĝa, riskema, aventurema, bonkora - perfekta virino)
8. Kio estas Linda? (Linda estas vere belulino, ŝi estas studentino en la universitato)
9. Kio okazis post la telera, glasa kaj turka-kafa milito?  
(la blondulo ne plu troviĝas en restoracio)

## Konsilo pri KIA/KIEL

Ne malmultaj esperantistoj foje misuzas Kiel en la loko de Kia, kaj inverse. Tamen eblas distingi ilin per simpla regulo:

Per **Kia** oni demandas kvaliton, do adjektivon  
Per **Kiel** oni demandas manieron, do adverbon

**Kia** ⇨ a  
**Kiel** ⇨ e

Kia estas via amiko? - Li estas bonkora. Kiel vi ekkonis lin? - Hazarde, enbuse.  
Kia ŝajnas la tablo? - Ĝi ŝajnas malbona. Kiel vi manĝis? - Mi manĝis malbone.

Mi ne sciis, kiel mi reagu. Ĉu rapide, ĉu malrapide? Mi ne sciis, kian muzikon mi aŭskultu. Ĉu rapidan, ĉu malrapidan?

Estas malbelstile uzi Kiel kune kun t. n. kopuloj (verboj, kiuj precizigas la naturon de rilato inter substantivo kaj adjektivo). Kopuloj estas ekzemple: esti, iĝi, igi, ŝajni, resti.

La verbo "aspekti" duone apartenas al tiu grupo, ofte en parolata lingvo ĝi estas ankaŭ uzata lige kun adverbulo.

Post la malsano, ŝi restis pala. Kia ŝi restis? (Ne: Kiel ŝi restis?)

En kunmetitaj tempoj "esti" funkcias kiel helpverbo, ne kiel kopulo. Ĝi povas esti anstataŭigata per simpla verba finaĵo. Tial, en kunmetita tempo ĝi povas aperi kune kun Kiel.

Tom estas vestita bele. (Tom vestitas bele.) - Kiel li estas vestita?  
(Sed: Tom estas bela en siaj vestaĵoj. - Kia li estas en siaj vestaĵoj?)

## KIA(N) - KIEL

1. Li eliris kun papera sako. - Kun .... sako li eliris?
2. Mi pensis ke li forveturos aŭte. - .... li forveturos?
3. Mi notis lian aŭtan numeron. - .... numeron mi notis?
4. Mi sekvis lin iom malproksime. - .... mi sekvis lin?
5. Li estis vestita per vestoj multkoloraj. - .... li estis vestita?
6. .... ĝojo vidi vin ĉi tie!
7. .... estas via sano? - Mi sentas min bone, dankon!
8. Mi sentas min bone, .... post saniga dormo.
9. Ŝi estas tia homo, .... mi neniam ekkonis antaŭe. Ŝi estas ege kuraĝa.

Solvo: 1 kia; 2 Kiel; 3 Kian; 4 Kiel; 5 Kiel; 6 Kia; 7 Kia; 8 kiel; 9 kian

# ĉapitro 17

---

## Demandoj

1. Pri kio parolas la policano preskaŭ krie al sia edzino? (Li ne scias kial Gerda estas kaptita)
2. Kion instruas Gerda? (Historion)
3. Pri kiaj lingvoj ŝi estas specialisto? (Pri sekretaj lingvoj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj)
4. Kiuj estas la faktoj de la tuta rakonto?
5. Kiu estas la alta blondulo? (frato de Marta)
6. Kiu estas Marta? (unu el la universitataj flegistinoj)
7. Kial la policanoj ankoraŭ ne pridemandis la blondulon?  
(Por ke li ne suspektu, ke ili suspektas lin)
8. Kiu estas la sola ŝanco por retrovi Gerdan, kaj kial? (la junulo; por sekvi kaj observi lin)

## Konsilo pri GE-

**GE-** estas necesa kiam oni celas ambaŭ seksojn pluraligante vorton, kiu en sia baza formo estas unuseksa (listo de la unuseksaj vortoj troviĝas en ĉap. 1, sub Konsilo pri -in-).

Mi havas patron. Mi havas patrinon. Mi havas **gepatrojn**.

Plejmulte da porhomaj vortoj estas ambaŭseksaj. Por ili **GE-** estas tute nenecesa kaj laŭ la regulo **NECESO KAJ SUFIĈO** oni uzu ĝin nur se oni volas speciale emfazi la ambaŭseksecon de iu grupo.

Mi parolis kun Tom kaj Linda. Ili estas studentoj kaj miaj amikoj.  
Ĉe tablo sidis amantoj. **Geamantoj**.

Foje utilas uzi **GE-** ankaŭ ekster la pluralo:

Mia **gepatra** lingvo; libereco, egaleco, **gefrateco**.

Tro ofta uzado de **GE-** malelegantigas la lingvon. Krome ĝi ŝajnigas kvazaŭ ĉiu porhoma vorto estus en sia baza formo vira. Esperanto aspektus do multe pli vire dominata ol ĝi reale estas.

## PER - POR - PRI - PRO

Ĉapitro 17 enkondukis la lastan el tiuj prepozicioj, kiuj ofte estas erare uzataj de komencantoj. Oni povas difini ilian funkcion jene:

<b>PER:</b> il-rilato	Per letero mi rakontis pri mia problemo.
<b>POR:</b> celrilato	Mi aĉetis florojn por vi, pro amo.
<b>PRI:</b> temrilato	Mi multe lernadis pri historio por sukcesi en ekzameno.
<b>PRO:</b> kialrilato	Mi veturas per biciklo pro pura plaĉo.

Novaj vortoj: biciklo, celo (20), ekzameno, floro, letero (18)

Por fari ekzerceton, skribu la suprajn 4 frazojn sen la prepozicioj al tabulo kaj petu de viaj lernantoj kompletigon.

# ĉapitro 18

---

## Demandoj

1. Kiu parolas komence de la ĉapitro? Pri kio? (la alta blondulo. Li provas igi Gerdan labori por si. Li diras ankaŭ, ke la obstineco de Gerda estas la kaŭzo de malsato)
2. Kiel sentas sin Gerda? (Pli kaj pli malforta)
3. Kiom facile ŝi tralegis la dokumenton? (Komence estis malfacile kompreni, sed iom post iom ŝi rememoris kaj sukcesis kompreni ĉion)
4. Kial ŝi ne diras al la junulo pri tio, kio estas skribita en la dokumento? (Ĉar ŝi promesis jam antaŭ longe al profesoro Kosadi, ke pri tio ŝi ĉiam silentos)
5. Kion kunportas la junulo venante la duan fojon? (radio-kaj-kased-aparaton)
6. Kia estas la voĉo de la filino de Gerda? (eta, plenda kaj plorema)

## La nombroj

preskaŭ ĉiuj nombroj nun estas enkondukitaj. Oni do povas sisteme ilin listigi kaj ekzerci.

nul, unu (ĉap. 5), du (14), tri (16), kvar (15), kvin (16), ses (20), sep (17), ok (16), naŭ (16), dek (15), cent (15), mil (16), miliono

Novaj vortoj: nul (aŭ nulo), ses (ĉap. 20), miliono, nombro.

Pere de la vorto "duone" en ĉap. 12 estas enkondukata la sufikso -ON-. Oni povas klarigi ties signifon kune kun tiu de -OP- kaj -OBL-, kiuj tute ne aperas en la teksto.

## El "Lasu min paroli plu!"

Traduko de la rakonteto nr. 18b (Mi atendas gravan leteron) el "Lasu min paroli plu!" bone trejnas la nombrojn.

# ĉapitro 19

---

## Demandoj

1. Kiuj estas Petro kaj Ralf? (Ili estas infanoj, amikoj)
2. Kial Ralf timigas Petron? (li ne volas, ke la granduloj sciu ilian sekreton)
3. Kiamaniere Ralf timigas Petron? (Ralf promesas plorigi lin, malpurigi liajn vestaĵojn, kuŝigi lin en akvon, veturigi lin en la montaron kaj forlasi lin tie)
4. Kion Ralf rakontas pri la virino? (Li diras, ke la virino, kiun ili aŭdis estas kaptato de li. Li gardas ŝin tie)

Rekomendata ludo: Majstra cerbo (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 20

---

## Demandoj

1. Kion aŭdas Gerda? (Paŝojn, bruon, kvazaŭ multaj homoj venus. Ŝi aŭdas ankaŭ kiel iu provas malfermi la pordon de la ĉambro)
2. Kion Gerda devas superi? (Fortan emon salti al la policano por kisi lin)
3. Kiun prezentas la policano al Gerda? (Tom, Bob kaj Lindan)
4. Pri kiu estas la unua demando de Gerda? (Pri sia filino)
5. Kiel la kaptintoj celis igi Gerdan kunlabori? (Per malsato, la mesaĝo de ŝia filino kaj soifo)
6. Por kio foriras Linda? (Por aĉeti manĝaĵojn)
7. Kial la policano petas Bob resti kun Gerda? (Ĉar la policano ne volas, ke Gerda suferu, kiam ŝi ne plu estos necesa al la aĉuloj)

## Koloroj

La vortkampoj koloroj en Gerda kompletiĝis ĉi-ĉapitre:

koloro (ĉapitro 16), ruĝa (8), blua (9), bruna (16), oranĝkolora (18),  
verda (20), flava (-), viola (-), nigra (20), blanka (-)

Novaj vortoj: flava, viola, blanka

# ĉapitro 21

---

## Demandoj

1. Pri kio parolas Gerda kaj Bob? (Pri siaj vivoj kaj la lastaj okazaĵoj)
2. Kio okazas post iom da tempo?  
(Ili ambaŭ aŭdas paŝojn. Bob saltas sub la liton kaj jen envenas la maldika aĉulo)
3. Kion promesas Gerda?  
(Traduki la paperon, se li liberigas ŝin kaj donas al ŝi manĝi)
4. Pri kio temas la papero? (Pri la trezoro de lumo-serĉantoj)
5. Kiu estas la Lumoserĉantoj?  
(Sekreta societo, kiu naskiĝis en la 15-a jarcento (lernantoj rakontas plu))
6. Kial la ŝtatoj persekutis ilin?  
(Ĉar la ŝtatoj miskomprenis iliajn celojn kaj ektimis tiujn homojn)
7. Kiam la aĉulo foriras? (Kiam Gerda finis la tradukon kaj klarigon)

## El "Lasu min paroli plu!"

El "Lasu min paroli plu!", la rakonteto nr. 21 a (Ho bela naskiĝurbo!) taŭgas kiel preparmaterialo, kiun lernanto povas uzi por verki etan priskribon de sia propra naskiĝurbo.

Rakonteto nr. 21 b (Adiaŭ, lando amata!) povas esti komune legata en la kurso. Oni povas poste diskuti, de kie kien iras la rakontanto.

# ĉapitro 22

---

## Demandoj

1. Kie troviĝas la loko indikita? (En kaverno, ĉe la piedo de monto)
2. Kial Tom tute ne ŝatus vojaĝi ŝipe? (Maro ĉiam igas lin malsana)
3. Kiel oni povas iri preskaŭ ĉien ajn? (Aviadile)
4. Kiom da homoj atendas la trezorserĉantojn? (Tri -- Linda, Tom kaj policano)
5. Kion rimarkis Linda observante la vojon? (Aŭton)

## El "Lasu min paroli plu!"

La rakonteto nr. 22b (Skribas malliberulo) donas indikojn pri letterskribado. Kiel hejmtasko, lernantoj skribu mem leteron al nekonato, en kiu ili rakontu pri si mem. Troviĝas vortkampoj "leteroj" en la suplemento. Vi pretas korekti la leterojn. Jen bona momento por atentigi la lernantojn pri la ebleco havi leteramikojn per Esperanto. Letterskribado estas bona vojo (por multaj la sola vojo) en Esperantujon.

# ĉapitro 23

---

## Demandoj

1. Kiel Bob sukcesis antaŭi la bandon? (Danke al Gerda, ŝi telefone aranĝis, ke la veturilo atendu lin ĉe la flughaveno kaj ke ŝoforo veturigu lin ĉi tien)
2. Kiom da trezorserĉantoj envenis la kavernon? (Kvar -- flegistino Marta, la alta blondulo kaj du aliaj viroj)
3. Kio mirigis la tri studentojn? (Ke ili ekvidis du konatajn profesorojn)
4. Kie, laŭ la malnova dokumento, troviĝas la trezoro? (En kofro, metita en kavon, aranĝita en rokoj kaj ŝtonoj)

## El "Lasu min paroli plu!"

La rakonteton nr. 23b (Ameriko, jen mi venas) oni povas bone role legi kaj diskuti. Ĉu la lernantojn interesas la moviĝo de la dolaro? Kion ili scias aŭ opinias pri Usono?

## -ONT-/-OT-

Pere de la rakonteto "Ameriko, jen mi venas" el "Lasu min paroli plu!" estas enkondukata la participo -ONT-.

Materiale pri la participoj troviĝas en la suplemento.

Rekomendata ludo: Boglo (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 24

---

## Demandoj

1. Kia aspektis la trezoro? (Estis nur papero kaj libro)
2. Kion laŭtlegis Ronga? (Ke ili trovis trezoron de la lumo, kiu estas pure spirita)
3. Kiam Marta eksciis pri la trezoro de la lumoserĉantoj?  
(Kiam ŝi estis flegistino en la hospitalo kaj ĉeestis kirurgian operacion de profesoro Kosadi, kiu senkonscie parolis pri la trezoro)
4. Kie profesoro Kosadi faris historian esploron? (En la Vatikana biblioteko)
5. Kion profesoro Kosadi eksciis pri la trezoro en Vatikana biblioteko?  
(Ke la dokumento indikas, kie troviĝas la trezoro)
6. Kiel Marta eksciis pri la trezoro?  
(Ŝi injektis dormigan substancon al la profesoro kaj pridemandis lin)

## El "Lasu min paroli plu!"

La rakonteton nr. 24b (La ĝojoj de petveturado) unu lernanto povas legi kaj alia lernanto (prepariĝinta antaŭe) povas kompletigi la dialogon. Tiu rakonteto estas ankaŭ bona bazo por skeĉo.

## Pri -UM-

La vorto "proksimume" kvazaŭ kaŝe enkondukas tiun ĉi sufikson. Aliaj vortoj fareblaj per -um-:

aĉetumi, aerumi, akvumi, amikumi, amindumi, bierumi, brakumi, drogumi, filozofiumi, ideumi, leterumi, mezumi, muzeumi, partumi, plenumi, rapidumi, sekretumi, tendumi, umi

UM utilas por aldoni la ideon de ĉirkaŭeco, malprecizeco al vorto. Plejofte ĝi estas uzata por verbigi substantivan radikon, donante al la lingva stilo iometan leĝerecon, neseriozecon.

aĉetumi: aĉetadi en diversaj butikoj, vendejoj, eble sen klare antaŭe fiksita itinero.  
aerumi: refreŝigi aeron en ĉambro per malferma fenestro aŭ ventumilo.  
brakumi: teni ion aŭ iun en siaj brakoj.  
sekretumi: emi al sekretoj, aspekti sekreteca.  
umi: nedifinita anstataŭiganto por ajna verbo. Uzata, kiam oni volas esti nepreciza.

Rekomendata ludo: Umi (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ĉapitro 25

---

## Demandoj

1. Kiel Marta ricevis fotokopion de la dokumento?  
(Ŝi simple prenis la dokumenton el paperujo de la profesoro)
2. Kial Ronga enmiksiĝis en la aranĝon?  
(Li daŭre bezonas multe da mono kaj li organizis la aferon)
3. Kun kiu celo vizitadis Gerdan la frato de Marta? (Li provis igi ŝin traduki la dokumenton)
4. Kiel oni povus kompreni, ke la aĉuloj agis amatore?  
(Neamatoroj en simila situacio mortigintus Gerdan tuj kaj ne hezitus)
5. Kial Bob rigardas Gerdan kun iom stranga esprimo?  
(Ĉiu lernanto povas respondi tion )

Rekomendata ludo: Multaj vortoj el unu (rigardu ĉapitron Ludoj)

# ludoj

---

Multaj ludoj de ĉi tiu kolekto estas ĉerpitaj el la libreto "lingvaj ludoj de GEJ" (kiu interesiĝas pri pluj ludoj, mendu ĝin ĉe GEJ), kelkaj ludoj venas el la lernolibro "Tesi la testudo", aliaj de diversaj fontoj.

---

## Aranea reto

Bezonata materialo: facile disolvebla fadenbulo.

La ludantoj sidas en cirklo. La gvidanto ĵetas la fadenbulon al iu ludanto kaj diras kunmetitan substantivon, ekz. "dommuro". La komencon de la fadeno li retenas en la mano. La alia ludanto volvas la fadenon unufoje ĉirkaŭ sian fingron, ĵetas la bulon al iu kontraŭe sidanta kunludanto kaj diras ekz. "murgazeto". Tiu same daŭrigas dirante eble "gazetpapero". La sekvantoj daŭrigas per vortoj kiel "paperfabriko", "fabrikĉefo", "ĉefetaĝo" ktp. Tiel iom post iom estiĝas aranea reto, kiun post kelka ludtempo oni povas sammaniere redisvolvi.

## Babilona salato

Unu ludanto devas dum momento forlasi la ĉambron. Dume la aliaj interkonsentas pri plursilaba vorto kaj "disdonas" al malgrandaj grupoj po unu silabon de la vorto. Ekzemplo: "televidadaparato": la unua grupo ricevas la silabon "te", la dua "le", la tria "vid", la kvara "a", la kvina "pa", la sesa "ra", la sesa "to".

Nun la elirinta ludanto envenas. La aliaj komencas samtempe kaj seninterrompe krei siajn silabojn. La grupoj povas en la salono intermiksiĝi kaj cirkuli. La divenanto devas eltrovi kaj kombini la ĝustan vorton el la silaba salato.

## Bildtitoloj

Bezonata materialo: paperstrioj kaj skribiloj.

La grupo sidas ĉirkaŭ la tablo. Ludanto n-ro 1 elpensas simplan temon kaj notas ĝin supre sur la paperstrio. Sub la skribaĵo ludanto n-ro 2 pentras malgrandan bildon konvenan al la teksto. Nun la teksto skribita de n-ro 1 estas forfaldita, tiel ke nur la bildo restas videbla. Sub ĝi n-ro 3 notas tekston, kiu karakterizas la bildon. Post kiam la bildo estas forfaldita, n-ro 4 desegnas bildon al la lasta teksto, ktp.

Fine de la rondiro estas malfaldita kaj legata la strio kiel tuto.

Variante la rondo povas prilabori plurajn striojn samtempe.

## Boglo

Por tiu ludo oni bezonas tabulon, grandan paperfolion aŭ - prefere - la en ludilvendejoj aĉeteblan ludon "Boggle" (eldonita de PARKER, 1985).

Kaŝe, sur tabulon aŭ paperfolion la ludestro skribas 16 literojn en hazarda ordo en kvadraton de 4x4 spacoj (per la fabrikita ludo kubo transprenas tiun laboron). Rezultas ekz. la jena bildo:

```
E S T T  
C N R I  
T A F L  
T G R H
```

La ludestro malkovras la literaron, kaj ene de 2 aŭ 3 minutoj ĉiu skribas sur folion tiom da vort(radik-)oj kiom ŝi/li trovas. Oni rajtas kunligi literojn al vortero aŭ vorto en la sekvo kiel moviĝas la reĝo en ŝakludo. Finaĵojn -a, -e, -i, -j, -n, -o, -u oni ellasas. Literoj kun supersignoj ne aperas. Oni rajtas uzi C kiel Ĉ, G kiel Ĝ, ktp.



## Litera salato

Bezonata materialo: stoko da kartoj kun Esperanto-literoj (facile memfareblaj).  
La grupo laŭhazarde prenas aron da kartoj kaj klopodas kombini Esperanto-vortojn el ili.  
Poste iuj ludantoj devas inventi fantazian rakonteton kun la ĵus kombinitaj vortoj.

## Majstra cerbo

Po 2 ludantoj. Ĉiu havas antaŭ si paperon, sur kiun li supre skribas 3-, 4-, 5-, aŭ 6-literan vorton (eblas ankaŭ apostrofitaj substantivoj). Oni faldas la paperon tiel, ke la alia ne povas vidi la vorton. Oni anoncas al la alia, kiom da literoj la kaŝita vorto havas. Poste la ludantoj klopodas alterne diveni la vorton de la alia - per aliaj (esperantaj) vortoj, kiuj devas havi minimume la longecon de la celvorto. Oni skribas la diven-/serĉ-vorton sur sian paperon kaj la alia komparas ĝin kun la kaŝita celvorto. Por la komparo validas nur tiom da literoj de la serĉvorto, kiom longas la celvorto.

Por ĉiu litero el tiu parto, kiu aperas an cel- kaj serĉ-vorto en la sama pozicio, oni ricevas cirklosignon, por ĉiu litero el tiu parto, kiu jes aperas en la celvorto, sed alipozicie, oni ricevas krucosignon apud la celvorton. Ekzemplo:

A kaŝe: (celvorto) P A P E R '  
B divenne: (serĉvorto) P A R T O = oo (pro la P A), x (pro la R)  
F R A T O = xx (pro la R A) B nun scias, ke T O antaŭe ne donis la cirklojn  
P A R K E = oox (aŭ K aŭ E devas esti en la celvorto)  
P A R K I = oox (do, E estas en la celvorto, kaj ne K)  
P A N E R' = oooo (nur N povas esti malĝusta)  
P A P E R' = ooooo

Gajnas tiu, kiu unue trovis la serĉitan vorton.

## Manĝigo de rabobestoj

Bezonataj: kelkaj bombonoj.

La ludantoj staras en rondo. La gvidanto anoncas, ke post la malsatiga laboro endas nun manĝi iom, kaj ke tio okazos en formo de manĝigo de rabobestoj. Nun li flustras al ĉiu ludanto nomon de besto en la orelon (urso, leono, lupo ktp.), tiun vorton aŭdu ĉiam nur la respektiva unuopa ludanto, sed unu sama bestonomo povas esti donata plurfoje. Poste li metas unu-du bombonojn meze de la rondo sur la plankon kaj vokas iun bestonomon. La ludantoj kun tiu nomo ĵetas sin sur la bombonojn, kaj la plej rapida el ili sukcesos kapti ilin. Post tri-kvar-foja ripetiĝo la gvidanto anoncas, ke li disdonos nun novajn bestonomojn por fari la ludon pli interesa. Laŭeble rapide li flustras nun al ĉiuj ludantoj la saman nomon - "kameloj" - en la orelon. Poste li denove vokas: "Tigroj! - ah, ĉifoje ni ja ne havas tigrojn! - do: kameloj!"

Se inter la ludantoj ne troviĝas kelkaj aparte retenemaj, nun ĵetos sin tuj dudeko da "kameloj" sur la bombonojn en la mezo.

## Multaj vortoj el unu

Bezonata: preparita listo kun proksimume 10 taŭgaj vortoj.

La gvidanto nomas vorton, ekz. "harmonio" aŭ "serpento". La ludantoj devas formi nun kiel eble plej multajn vortojn el la literoj entenataj en la donita vorto, do: haro, horo, mono, nomo ktp. Kiu post kvin minutoj havas la plej multajn vortojn, gajnas la unuan poenton. La gvidanto donas la duan vorton, kaj la ludo daŭras ĝis aŭ la vortoj aŭ la ludantoj estas elĉerpitaj.

Varianto: Oni ĉiam forstrekas la vortojn, kiujn ĉiuj havas, aŭ kiujn ankaŭ aliaj havas. Tio tre malfaciligas la ludon.

## Onklo Ludoviko fajfas buteron sub la lito

La ludantoj sidu ĉirkaŭ tablo. Ĉiu devas elpensi rakonteton kaj skribi ĝin, sed post ĉiu unuopa vorto oni interŝanĝas la foliojn, tiel ke ĉiu pludonas sian folion al la dekstra najbaro kaj prenas la folion de la maldekstra najbaro. La ĵus skribitan vorton oni forfaldas, tiel ke ĝi ne plu estas videbla.

Oni devas antaŭe fiksi, ke ĉiuj frazoj konsistu el difinita vortordo, ekz. subjekto (prefere nomo) - verbo - objekto - prepozicio - substantivo (vidu la nomon de la ludo).

Tiel produktiĝas pluraj tute konfuzitaj (kaj ofte ridigaj) frazoj. Ili estas poste laŭlegataj.

## Rakonteto (Plurakonto)

La ludantoj mem verku la tekston de la sekvonta ĉapitro, uzante la novajn vortojn laŭ la vortlisto. Ili ne jam konas la tekston de la ĉapitro. Post la verkado ili komparas, laŭtleĝante siajn rakontetojn.

Variante, ili povas verki memstaran rakonteton sur la bazo de la vortlisto por unu ĉapitro. La gvidanto povas fokusigi la enhavon de la rakontetoj, donante titolon.

La titolo povas esti ĉerpita el la akompana libro "Lasu min paroli plu".

## Rapidaj pentristoj

Bezonata materialo: tabulo kaj kreto (eblas ankaŭ grandaj paperfolioj, aŭ eĉ pli bone skribprojekciilo).

Tiu ĉi ludo estas imitaĵo de la germana televida elsendo "Die Montagsmaler". La ludantaro estas dividita en du grupojn. Ludas ĉiam nur unu grupo, poste la alia. Po unu persono el la ludanta grupo devas sinsekve veni al la tabulo kaj desegni objekton elpensitan de la ludgvidanto. La aliaj grupanoj devas diveni la objektojn. Venkas tiu grupo, kiu dum difinita tempo sukcesas desegni kaj diveni plej multajn objektojn. La gvidanto devas antaŭe elpensi sufiĉan kvanton da objektoj. Konsilinde estas, havi la vortojn sur unuopaj slipetoj. Per la elekto de la vortoj oni povas variigi la gradon de malfacileco (por progresintoj la objektoj povus ekzemple esti proverboj).

## Romano

La instruisto skribas vorton sur la tabulon. Laŭvice la ludantoj aldonas vorton aŭ du vortojn tiel, ke iom post iom fariĝas kompleta frazo.

Kun lertaj lernantoj tiu ludo funkcias ankaŭ sen tabulo. Tiam ĉiu devas ripeti la tutan antaŭe iĝintan frazon.

## Umi

Volontulo forlasas la ĉambron. Dume la aliaj interkonsentas pri iu verbo, kiu estu "umi"; poste ili revokas la eksterulon.

Li nun laŭvice demandas al la aliaj po unu demandon por eltrovi la kaŝitan verbon. Devas esti ĉu- demando.

Ekzemple, se oni elektis "umi" = "dormi": "Ĉu homoj umas?" - "Jes"

"Ĉu vi jam umis hodiaŭ?" - "Jes" "Ĉu vi umas nun?" - "Ne"

"Ĉu oni umas sola?" - "Jes" (ne permesatas pretervice respondi: "dependas...")

## Vortoĉenoj

Triparta vorto estas skribata en supran angulon sur tabulo aŭ granda paperfolio. Laŭvice, la ludantoj anstataŭigas parton de la vorto per alia, tradukante aŭ klarigante la novan vorton. La antaŭe ŝanĝitan parton ne povas ŝanĝi la posta ludanto.


Ekzemplo:

grandulo	grandigo	malmulto	... ..
grandula	reigo	nemulto	...
grandiĝa	reveno	nemultis	
grandiĝo	malveno	neeblis	

Eblas senfine varii la regulojn de tiu ludo. Elprovu kvarradikajn vortojn, aŭ ŝanĝadon senbaran, aŭ plurajn teamojn.

## enhavo

- Bestonomoj
- "Ekzercoj" (folioj por la lernanto)
- "Demandoj" (folioj por la lernanto)
- Gravaj vorteroj laŭ ĉapitroj
- Vortkampoj:
  - Fruktoj, Legomoj
  - Bestoj
  - Leteroj
  - Renkontiĝoj
- Tabelvortoj
- Verboj, Participoj
- Participoj
- Kunmetitaj tempoformoj
- Afiksoj
- Prepozicioj



# BESTONOMOJ

Pferd	Hengst	Stute	Fohlen
horse	stallion	mare	foal
ĉevalo	virĉevalo	ĉevalino	ĉevalido
Huhn	Hahn	Henne	Küken
chicken			
koko			
Hund			
dog			
hundo			
Schwein			
pig			
porko			
			Lamm
			lamb
			ŝafido
		Kuh	
		cow	
		bovino	
	Ziegenbock		
	billy-goat		
	virkapro		

# BESTONOMOJ

arklys	kumelys	kumelė	kumeliukas
horse	stallion	mare	foal
ĉevalo	virĉevalo	ĉevalino	ĉevalido
višta	gaidys	višta	viščiukas
chicken			
koko			
ŝuo			
dog			
hundo			
kiaulė			
pig			
porko			
			ėriukas
			lamb
			ŝafido
		karvė	
		cow	
		bovino	
	ožys		
	billy-goat		
	virkapro		

# ekzercoj

---

②

## Kio(n) - Kiu(n) - Tiu

1. Ki..... estas en la angulo? - la blondulo.
2. Ki..... estas en la angulo? - la tablo.
3. La blondulo, ki..... estas en la angulo, estas alta.
4. La tablo, ki..... estas en la angulo, estas malnova.
5. Ki..... tablo estas via? .....i..... en la angulo.
6. Ki..... vi demandas? Neni.....
7. Ki..... demandon vi havas? Neni.....
8. Ki..... vi amas? .....i..... fortulon.
9. Ki..... vi vidas? .....i..... tason.

## Traduko

Li staras	mi vidas ŝin	li amas ŝin	tio estas simpla
Li stariĝas	mi vidiĝas	li enamiĝas	tio simpliĝas

## Ĉu - Se

1. Mi ne povas vidi, ..... la junulo parolas al knabino aŭ ..... li nur rigardas al ŝi.
2. Vi vidas lin tute bone, ..... ne?
3. Turnu vin iomete, ..... vi volas.
4. .... li agas strange, li estas strangulo.
5. Mi alparolas ŝin, ..... ŝi rigardas al mi.
6. Mi ne scias, ..... mi alparolu ŝin aŭ ne.
7. .... ŝi reparolas al mi, ..... mi parolas al ŝi?
8. Li estas en universitato, ..... li estas studento.
9. Mi ne certas, ..... li estas studento. Li estas tro maljuna.

③

## Traduko

neebla	malebla	rigardebla	videbla	nevidebla	revidi	revidebla	turni
turnebla	turniĝi						

## Akuzativo

1. Ili..... demandas mi..... .
2. Multo..... diras li..... al la studentoj.
3. Al la studentoj.... li.... demandas tio....., kio.... li.... ne scias, sed ili.... diras nenio.... .
4. Ili..... ne scias.
5. Linda..... ne sidas sola..... . Venas bela..... junulo..... .
6. Tio..... certe estas la universitato..... .
7. La studentoj..... montras al mi..... la studenta..... restoracio..... .
8. Mi..... petas vi..... , diru al mi..... tio..... .
9. La blondulo..... , kiu..... staras en la restoracio..... , estas stranga..... .
10. Ili..... ne pardonas la nova..... studento..... .
11. Li..... ne komprenas. Tio..... estas mistera..... .
12. Li..... preferas sinceraj..... junuloj..... .

# ekzercoj

---

## Pluralo

vidi - mi - studento  
rigardi - studento - blondulo  
ami - Bob - tiu blonda knabino  
saluti - maljunulo - ili  
montri - alia taso - Linda  
kompreni - Esperanto - alta viro  
revidi - bela studento - tiu stranga viro  
voli - kafo - nova studento  
peti - simpla spegulo - stranga virino

④

## Traduko

bela - belaĵo forta - fortaĵo stranga - strangaĵo  
okazi - okazaĵo nova - novaĵo

## Pronomoj

1. Diru al mi..... li..... nomon. Ĉu Ronga? Li..... estas mistera.
2. En ni..... universitato oni..... vidas li..... nur kun virinoj.
3. Li..... estas profesoro lingvistika kaj li..... studentoj pleje estas inaj.
4. Ili..... instruas ankaŭ Gerda. Ŝi..... fako estas kriptografio.
5. Ni..... kunstudentoj ne scias, kio estas tio. Ĝi..... temas pri sekretaj lingvoj.
6. Oni..... lernas tiuj.... lingvoj..... por kompreni ili..... sekretajn mesagojn.
7. Iom scivoliĝis mi..... pri tiu scienco. Sed tiu Ronga: eble li..... volas ŝi..... pli ol ŝi..... sciencon.

⑤

## -US

Se mi estus profesoro ...  
Se mi estus Bob ...  
Se mi estus Linda ...  
Se mi estus studento ...  
Se mi estus vir(in)o ...

## Se - Kiam

1. Mi ne scias, ..... ŝi venas al ni.
2. Mi tre multe laborus, ..... mi povus.
3. .... li venis al la universitato por instrui, la studentoj povas lerni ĉe li.
4. .... li venis al la universitato, li instruis lingvosciencan.
5. Mi volas paroli kun vi, ..... vi permesas.
6. Mi parolis kun ŝi, ..... ŝi sidis en la restoracio.

# ekzercoj

---

⑥

## Akuzativo

1. La blondulo..... metis sukero..... en la taso..... da kafo..... .
2. Li..... iras en la restoracio..... , al la bela..... knabino..... , sed li..... falas en la koridoro..... .
3. Bob konsentas kun Linda..... .
4. Ili..... observas la studentoj..... .
5. Iu..... perdis aĵo..... en la restoracio..... .
6. Ili metas ĝi..... sur la tablo..... kaj decidas promeni en la ĝardeno..... ĉe la universitato..... . Ili..... ekiras.

Nova vorto: ĝardeno

## Traduko

tie/ĉi tie tiu tago/ĉi tiu tago rigardi/forrigardi/rigardeti vidi/ekvidi/revidi  
pali/paliĝi/paletiĝi iri/foriri/ekiri kafo/kafujo rubo/rubujo

Nova vorto: rubo.

⑦

## Kiel - Ol

1. Ĉu Tom estas same alta .... Bob, aŭ ĉu li estas pli alta .... Bob?
2. .... vi scias, Bob estas pli alta .... Tom, sed malpli alta .... la stranga blondulo.
3. Mi preferus resti ĉi tie .... iri informi la aŭtoritatojn.
4. La vero ofte ŝajnas pli absurda .... imagaĵoj.
5. Li iĝis pli kaj pli forta, li iĝis forta .... fortulo.
6. Iru pli rapide, iru malpli rapide, iru .... vi volas!

⑧

## Ĉu tio veras?

1. En la universitata memserva restoracio Linda sidas kaj pensas.
2. Ŝi pensas tre trankvile kaj ŝiaj pensoj iĝas pli kaj pli trankvilaj.
3. Ŝi observas la junan viron, kiu metis ion en la kafon de Gerda.
4. Tom kaj Bob estas ne longe for.
5. Linda scias, ke ŝi sekvos la junulon.
6. Estas jam vespero, sed baldaŭ ne venos nokto.
7. Linda pensas, ke ŝi atendos en la koridoro.
8. Linda sukcesis decidi, kion ŝi faru.
9. Ŝia koro batas rapide.
10. Kaj jen, antaŭ ol Linda povas decidi, la juna viro ekstaras.
11. Li rigardas al Linda.
12. Kaj ŝi aŭtomate ekstaras kaj ekpaŝas al la sama pordo.
13. Tamen Linda ne sekvas la junulon.

# ekzercoj

---

## Akuzativo

1. La sukerpeco..... falis en la kafo..... .
2. Sed mi..... ne deziras sukero..... en mia kafo..... .
3. Lakto..... mi..... preferas.
4. Rigardu, Linda..... venas en la restoracio..... .
5. Eble ŝi..... deziras kafo..... kun sukero..... .
6. Ni..... kaŝu la drogo..... en la poŝo..... .
7. Atentu! La lakto..... falas sur la tablo..... .
8. Sekvu la studentoj..... ĉi-tiu..... tago..... .
9. Ili..... iras al la urbo.
10. La posta..... tago..... mi..... atendis ŝi..... en la restoracio..... .

Nova vorto: Lakto (ĉap. 21)

## SI

1. Mi konas sin/min. 2. Mi do ne volas vidi min/sin en la spegulo. 3. Petro estas pli bela ol mi, kaj mi ofte vidas lin rigardi lin/sin en la spegulo. 4. Kiam li turnas lin/sin al mi, mi plene vidas sian/lian belan aspekton.
5. Vi volas piediri reen al sia/via ĉambro? 6. Vi promenos longe, sed ne timu ke siaj/viaj kruroj tro laboros kaj perdos ilian/sian tutan forton.
7. Ĉu vi havas informojn pri Ana? 8. Ŝi kuŝis en ..... (ŝi.../si...) ĉambro kaj ne sentis ..... (si.../ŝi...) tre bone. 9. Tom iris al ..... (ŝi.../si...) kun ..... (li.../si...) kuracisto, sed ŝi ne rigardis tiun kuraciston serioza. 10. Ŝi preferas ..... (si.../ŝi...) kuraciston, ŝi vere ne amas ..... (li.../si...). 11. Li do forsendis ..... (li.../si...) kaj vokis ..... (si.../ŝi...). 12. Strange, kiam ŝi vidis ..... (si.../li...) kuraciston, ŝi sentis ..... (si.../ŝi...) malbone, sed tuj kiam ŝi vidis ..... (ŝi.../si...) kuraciston alveni, ŝi jam sentis ..... (ŝi.../si...) pli bone. 13. Oni ..... (oni.../si...) demandas, ĉu ŝi ametas ..... (li.../ŝi.../si...) kuraciston.

9

## -ITA

agi ami aŭdi bani bati decidi demandi devi deziri diri diskuti dormi ekzisti fali fari flegi gravi halti helpi imagi informi instrui kompati kompreni koni konscii konsenti kuŝi labori lasi lerni memori meti okazi okupi okupiĝi opinii paroli paŝi perdi permesi peti povi pravi promeni provi resti rigardi riski saluti scii sekvi sendi senti servi sidi stari sukcesi suspekti sveni ŝajni temi trovi turni tuŝi veni vidi vivi voki voli zorgi

## Demandovortoj

1. .... diris la kuracisto? - La kuracisto diris: "Restu senzorga, nenio malbonas".
2. .... vi resaniĝos? - Mi resaniĝos baldaŭ.
3. .... vi iros unue post la resaniĝo? - Unue mi iros en bonan restoracion.
4. .... vi iros sola? - Ne, amikoj iros kun mi.
5. .... okupiĝas pri vi dum la malsano? - Plejofte Anjo kaj Pablo okupiĝas pri mi.
6. .... estas via patrino? - En sia oficejo; ŝi devas multe laboradi tie.
7. .... vi devas ne iri piede? - Ĉar mia kruro malsanis, senfortas.
8. .... vi ekmalsanis? - Mi ekmalsanis subite kaj forte.
9. .... tio okazis? - Tio okazis en mia laborejo.
10. .... ili metis sur vian laborlokon? - Neniun, la laboro atendas min, ĝi restas nefarita.
11. .... ili metis neniun? - Ĉar laboristoj estas malsimple troveblaj por mia laboro.

# ekzercoj

---

⑩

## Resumo de la ĉapitroj 1 ĝis 10

- Ronga, la profesoro pri lingvistiko, volis ke ŝi ven..... al la universitato ..... instru..... kaj labor..... kun li.  
Kiam ili aŭdas ŝi..... falbruon el la koridor....., Bob kaj Tom rapidas por helpi ŝi..... . Bob metas ŝin bone, tiel ..... ŝi kuŝu komforte, kaj Tom ir..... vok..... flegistinon.
- Ŝi observ..... lin kaj kiam li eliras tra la pordo alurb....., ŝi..... sekvas li..... .  
Linda estas junulino iom tim....., certe belega. Tom am.....as ŝin, li havas okulojn nur ..... ŝi.
- Li povas rakont..... al ili....., ki..... estas la knabino: ŝi estas Gerda, nova instruist..... pri kriptajscienco (.....novaj sekretaj lingvoj).
- Tom kaj Linda estas student..... . En universitat..... restoraci....., ili observas blond..... junul....., kiu agas plej strange: dum li parolas ..... knabino, li kaŝ..... metas io..... en ŝi..... kafotaso..... .
- Li zorgas pri ŝi. Ĉu ŝi trov..... en danĝero? Ki....., fakte, ŝi iros? Kaj Gerda, kien ŝi..... foriĝis? Ki..... okaz..... kun ŝi, kion ..... volas ke ŝi far..... ?  
Jen demand..... respondi..... . ..... vi scivoliĝis? Do, ..... ek..... al la .....laborado !
- Eble estis drogo, ĉar tuj post ki..... ŝi ekstaras kaj forlasas la restoracio....., ..... la koridoro..... ŝi jam perdas la konscion.  
Intertemp....., Bob sid.....is ĉe Tom kaj Linda.
- Kiam Tom fine .....venas kun la flegistino, Gerda estas for, kaj Bob fal-sidas ĉe la koridor..... mur....., bat.....a surkape.  
Kion .....tempe faras Linda? Ŝi pli kaj pli .....trankvil....., lasite sola ..... la universitata restoracio kun la blond..... strang..... .
- Tiu flegistino, dika, grasa kaj parolema, nur post long..... diskut..... kun Tom konsciiĝas ..... tio, ke la afero urĝas. Se ŝi est..... pli zorgema, ŝi ..... rapidus kaj eble ne okazus la jeno:

## Ami - Deziri - Emi - Ŝati - Voli

Bob ..... la bonegan vivon en sia urbo.  
Tom ne ..... fidi la flegistinon.  
Li ..... , ke ŝi rigardu al lia direkto, sed ŝi tute ne ..... rigardi lin.  
Mi ..... kafon. Fakte, mi ..... tason da kafo nun.  
Tom ..... Lindan, li verŝajne eĉ ..... ŝin.

# ekzercoj

---

⑪

## Trovu la ĝustan frazofinon

1. Linda aliris la junulon kaj alparolis .....
2. Li turnis sin al ŝi, kun .....
3. Li fine demandis: .....
4. Kaj tuj li aldonis: "Bonvolu .....
5. Mi urĝe devas .....
6. Ĉiam mi miras vidi, ke .....
7. "Vi min miskomprenis, mi .....
8. Sekvi lin estus danĝere, sed se li veturas ....
9. Kaj li malfermas la .....
10. "Dankon, vi vere estas .....
11. "Ne dankinde", li .....
12. "Mi ne ŝatas la ideon, ke mi devos .....
13. Mi havas veturilon, sed .....
14. Ne estas facile igi .....
15. Ŝi forte deziras lin paroligi, sed ŝi .....
16. "Mi ne volas ĝeni vin. Estas jam .....

- a. pardon de la aŭto por ŝi.
- b. mi ne ŝatas aŭtojn."
- c. pardonu min, se mi respondas nee, sed al mi vere mankas tempo.
  - ĉ. "Kiel mi povus vin helpi?"
  - d. tiel bonkore, ke vi veturigas min."
  - e. lin: "Sinjoro, ĉu vi bonvolus helpi al mi?"
  - f. veturiloj entute funkcias."
  - g. lin diri ion, pensas Linda.
- ĝ. aŭte, mi petos lin akcepti min, kaj mi igos lin paroli.
  - h. tre afabla. Mi plej sincere dankas."
  - ĥ. veturi al la urbo.
  - i. timas samtempe malkontentigi lin.
  - j. vizaĝo ne tre kontenta.
  - ĵ. ne petas vin ripari mian veturilon."
  - k. venigi ripariston, mekanikiston.
    - l. respondas iom seke.

## IG - IĜ

Mi volis aspekti pli bela ol normale. Mi .....<sup>1</sup> min pli bela antaŭ la promenado. Antaŭ la promenado, mi .....<sup>2</sup> pli bela. Penjo ridis pri mi, ĉar mi plibel.....<sup>3</sup> min. Ni veturis en la urbon. Vetur.....<sup>4</sup> nin Penjo. Ŝi .....<sup>5</sup> mia amiko tuj post mia unua tago en la laborejo. Antaŭ la forveturo, ŝi trovis min en mia ĉambro, kie mi plibel.....<sup>6</sup>.

La urbo trov.....<sup>7</sup> tro malproksime de nia laborejo por iri piede. Penjo ne havas aŭton, sed ŝi sukcesis hav.....<sup>8</sup> al si la aŭton de Bob.

Post longa promenado en la urbo, ni volis eksidi en trinkejo. Tuj post kiam ni sid.....<sup>9</sup> ĉe tablo, iu ulo turnis sin. Li turn.....<sup>10</sup> al ni kaj ekrigardis nin. Ni eksentis nin malbonaj. Lia rigardado malbonsent.....<sup>11</sup> nin. Ni devis agi. Ni ne plu restis sidaj, ni restar.....<sup>12</sup>, tiel dev.....<sup>13</sup> lin fortunni sin. Li komprenis ke li ĝenis nin ade rigardante al ni. Ni kompren.....<sup>14</sup> al li ke rigardado povas esti maldiskreta.

Mi lernas multon en la urbo. Ĝi lern.....<sup>15</sup> min pri la vivo. Multhoma kunvivado lern.....<sup>16</sup> kvazaŭ aŭtomate en la urbo.

# ekzercoj

---

## Traduko

unuiĝi, reunuigo, reunuiĝo, kontentige, silentigi, urbiĝo, sanigo, saniĝi, senigi, konsciĝi, konsciigi, vesperiĝas, doktoriĝo, devigi, evidentigas, tagiĝo, renovigo, malpliigo

⑫

## Kunigo

- |                |              |
|----------------|--------------|
| 1. okulo       | a. nesufiĉe  |
| 2. proksima    | b. demandi   |
| 3. montri      | c. malmontri |
| 4. maltro      | ĉ. vidilo    |
| 5. sen         | d. loko      |
| 6. homo        | e. tre       |
| 7. malrespondi | f. deziri    |
| 8. el          | g. sidilo    |
| 9. ege         | ĝ. malfora   |
| 10. malne      | h. ulo       |
| 11. seĝo       | ĥ. jes       |
| 12. emi        | i. malkun    |
| 13. ejo        | j. vidigi    |
| 14. kaŝi       | ĵ. malen     |

⑬

## Traduko

maljunege malofte malfermi blondulo devigi ridinde novaĵo pordeto fermilo portisto malrapidigo helpilo decidema novulo aminda manĝejo finaĵo veturilo homaro montrilo zorgeme urbiĝo enhavo rapidigi ekveturi instruisto miskompreni junularo malseketa ridigisto sensoifigilo.

⑭

## Liber-

liberigi libereco libertempo malliberigita liberigebla liberpensulo liberiganto liberama malliberejo malliberulo.

⑮

## Vortoj nur el afiksoj

ino eki ujo iĝi ulo ree eco la malo ege ete emi indi ejo aĵo male inaĵo ebligi arigi etaĵo ariĝi malebla ilarujo ekemi ebleco

# ekzercoj

---

①6

## KIA(N) - KIEL

1. Li eliris kun papera sako. - Kun ..... sako li eliris?
2. Mi pensis ke li forveturos aŭte. - ..... li forveturos?
3. Mi notis lian aŭtan numeron. - ..... numeron mi notis?
4. Mi sekvis lin iom malproksime. - ..... mi sekvis lin?
5. Li estis vestita per vestoj multkoloraj. - ..... li estis vestita?
6. .... ĝojo vidi vin ĉi tie!
7. .... estas via sano? - Mi sentas min bone, dankon!
8. Mi sentas min bone, .... post saniga dormo.
9. Ŝi estas tia homo, .... mi neniam ekkonis antaŭe. Ŝi estas ege kuraĝa.

①7

## PER - POR - PRI - PRO

..... letero mi rakontis ..... mia problemo.  
Mi aĉetis florojn ..... vi, ..... amo.  
Mi multe lernadis ..... historio ..... sukcesi en ekzameno.  
Mi veturas ..... biciklo ..... pura plaĉo.

Novaj vortoj: biciklo, celo (20), ekzameno, floro, letero (18)

# demandoj

---

①

1. Kiu estas la plej bela virino en la tuta mondo?
2. Kiu estas la plej malserioza knabo en la tuta universitato?
3. Al kio iras Tom kun Linda?
4. Kiu sidas en angulo en la universitata restoracio?
5. Kiu iras al li?

②

1. Kio estas Linda?
2. Kiun rigardas Tom kaj Linda?
3. Kiu iras al la alta, blonda, juna viro?
4. Kio estas en la mano de la blondulo?
5. Kion vidas Tom kaj Linda plu?
6. Ĉu estas io en la mano de la blondulo?
7. Ĉu io estas en la taso de la knabino?
8. Ĉu Tom nun laboras tro multe?
9. Ĉu Tom amas Lindan?
10. Ĉu ŝi amas lin?

③

1. Kiu venis al Tom kaj Linda?
2. Kiel aspektas ili?
3. Kion Bob demandis al ili?
4. Ĉu ne gravas al Bob, ke Linda estas bela?
5. Kio estas pli grava?
6. Kiel aspektas la vizaĝoj de Tom kaj Linda?

④

1. Kiu estas la nomo de la knabino ĉe la blondulo?
2. Kiam Tom kaj Linda sciis la nomon de Gerda?
3. Kion ŝi faras en la universitato?
4. Kio estas Kriptografio?
5. Kiu volis, ke ŝi instruu kriptografion ?
6. Kiu estas Ronga?
7. Ĉu Gerda aŭ Linda estas pli bela?
8. Ĉu por Bob nur Linda estas la sola bela knabino?
9. Ĉu Tom konsentas kun Bob?

⑤

1. Kion la junulo verŝajne metis en la tason de Gerda?
2. Kiam li metis ĝin en ŝian tason?
3. Kiel Tom povas scii ke li ne simple metis pecon da sukero en ŝian tason?
4. Ĉu Gerda reagis iel?

# demandoj

---

6

1. Kion aŭdis Linda?
2. Kion ŝi pensis pri la bruo?
3. Kiel pensis Tom?
4. Ĉu Tom havis la saman penson kiel Bob?
5. Kiam ili decidis iri vidi?
6. Ĉu Linda iras kun Bob kaj Tom?
7. Kion devas observi Linda?
8. Kiun junulon devas observi Linda?
9. Kion Linda diras al Bob kaj Tom?

7

1. Kion ekvidis Tom kaj Bob ĉe la angulo?
2. Kio okazis al Gerda?
3. Ĉu Gerda perdis la vivon?
4. Kiel ni scias ke Gerda ne perdis la vivon?
5. Kio ŝajnas al Bob?
6. Kion opinias Tom?
7. Kiun la aŭtoritatoj eble decidus voki?
8. Kiel la knaboj metas Gerdan unue?
9. En kiun pozicion ili metas Gerdan?
10. Kion Bob opinias pri tiu pozicio?
11. Kiam tamen tiu estas la ĝusta pozicio?

8

1. Kion Linda observas en la universitata memserva restoracio?
2. Pri kiu pli kaj pli maltrankviliĝas Linda?
3. Kion volus ŝi?
4. Kiel Tom kaj Bob povus helpi al ŝi?
5. Kiam la juna viro ekstaras?
6. Al kiu direkto iras la juna viro?
7. Ĉu Linda reagis?
8. Kiel ŝi reagis?

9

1. Kiun aspekton havas la flegistino?
2. Kiu vorto ŝajne ne ekzistas en ŝia vortaro?
3. Kie svenis Gerda?
4. Kie oni svenas en ĉi tiu universitato?
5. Kial maltrankviliĝas Tom?
6. Kial ekhaltis Tom, kiam li revenis kun la flegistino?
7. Kio okazis al Bob?
8. Kiel sentas sin Tom?

# demandoj

---

⑩

1. Kial Tom ne emas fidi la flegistinon?
2. Kiam amikiĝis Tom kaj Bob?
3. Kie amikiĝis ili?
4. Kion ŝatas ambaŭ amikoj?
5. Kion Tom pensas pri la flegistino?
6. Ĉu estas aliaj flegistinoj en la universitato?
7. Kion li demandas sin pri Linda?
8. Kial li sentas sin ema zorgi pri ŝi?

⑪

1. Kiun aliris kaj alparolis Linda?
2. Kiel aspektis la vizaĝo de la juna blonda viro?
3. Kien devis urĝe veturi la junulo?
4. Ĉu Linda petis lin ripari ŝian veturilon?
5. Ĝis kie ŝi volis kunveturi?
6. Pri kio parolas Linda veturante?
7. Kiel respondas la junulo?
8. Kial la junulo estas silentema?

⑫

1. Kion faras Bob?
2. Pri kio parolas Tom, Bob kaj la flegistino?
3. Kial Bob petas alporti al li ion por trinki?
4. Kion diras la flegistino en sia ĉambro?
5. Tom petas Bob klarigi kio okazis. Kion respondas Bob?

⑬

1. Kiuj pensoj venas al Linda laŭvoje?
2. Kiel reagis la junulo, kiam Linda provis paroligi lin?
3. Kiel Linda klarigas sian scivolon?
4. Kial la junulo forgesis pri Linda?
5. Kion Linda rakontis pri siaj pensoj al la junulo?
6. Ĉu vere Linda volis helpi al la juna viro?
7. Ĉu li akceptas la proponon de Linda?
8. Pri kio pensas Linda vidante la forveturantan aŭton?

⑭

1. Bonvolu rakonti kiel Linda sentis sin kiam ŝi vekiĝis?
2. Kiel aspektis la ĉambro?
3. Kion Gerda pensas pri la plezuro esti libera?
4. Kiel provas Gerda liberiĝi?
5. Kio vekis ŝin (Gerdan)?
6. Pri kio parolis la infanoj?
7. Ĉu la reago de la infanoj estis kuraĝa?

# demandoj

---

15

1. Pri kio parolas Tom kaj Linda?
2. Kiu estas Tom?
3. Kion rakontas Linda al Tom?
4. Kio okazis al la junulo kiam Linda forlasis la aŭton?
5. Kiom da malsamaj specoj da pano vendas la magazeno?
6. Kion portis la junulo forirante el la magazeno?
7. Kial Linda ofte irus magazinon kaj aĉetus multon?
8. Kial ŝi ne faras tion?

16

1. Kion faris la junulo, kiam li eliris el tiu vendejo?
2. Kien subite li eniris?
3. Kial Linda hezitis?
4. Kiel aspektis la restoracio?
5. Kiujn manĝaĵojn manĝis Linda?
6. Kion faris la soldatoj en la restoracio?
7. Kia estas Linda?
8. Kio estas Linda?
9. Kio okazis post la telera, glasa kaj turka-kafa milito?

17

1. Pri kio parolas la policano preskaŭ krie al sia edzino?
2. Kion instruas Gerda?
3. Pri kiaj lingvoj ŝi estas specialisto?
4. Kiuj estas la faktoj de la tuta rakonto?
5. Kiu estas la alta blondulo?
6. Kiu estas Marta?
7. Kial la policanoj ankoraŭ ne pridemandis la blondulon?
8. Kiu estas la sola ŝanco por retrovi Gerdan, kaj kial?

18

1. Kiu parolas komence de la ĉapitro? Pri kio?
2. Kiel sentas sin Gerda?
3. Kiom facile ŝi tralegis la dokumenton?
4. Kial ŝi ne diras al la junulo pri tio, kio estas skribita en la dokumento?
5. Kion kunportas la junulo venante la duan fojon?
6. Kia estas la voĉo de la filino de Gerda?

19

1. Kiuj estas Petro kaj Ralf?
2. Kial Ralf timigas Petron?
3. Kiamaniere Ralf timigas Petron?
4. Kion Ralf rakontas pri la virino?

# demandoj

---

20

1. Kion aŭdas Gerda?
2. Kion Gerda devas superi?
3. Kiun prezentas la policano al Gerda?
4. Pri kiu estas la unua demando de Gerda?
5. Kiel la kaptintoj celis igi Gerdan kunlabori?
6. Por kio foriras Linda?
7. Kial la policano petas Bob resti kun Gerda?

21

1. Pri kio parolas Gerda kaj Bob?
2. Kio okazas post iom da tempo?
3. Kion promesas Gerda?
4. Pri kio temas la papero?
5. Kiu estas la Lumoserĉantoj?
6. Kial la ŝtatoj persekutis ilin?
7. Kiam la aĉulo foriras?

22

1. Kie troviĝas la loko indikita?
2. Kial Tom tute ne ŝatus vojaĝi ŝipe?
3. Kiel oni povas iri preskaŭ ĉien ajn?
4. Kiom da homoj atendas la trezorserĉantojn?
5. Kion rimarkis Linda observante la vojon?

23

1. Kiel Bob sukcesis antaŭi la bandon?
2. Kiom da trezorserĉantoj envenis la kavernon?
3. Kio mirigis la tri studentojn?
4. Kie, laŭ la malnova dokumento, troviĝas la trezoro?

24

1. Kia aspektis la trezoro?
2. Kion laŭtleĝis Ronga?
3. Kiam Marta eksciis pri la trezoro de la lumoserĉantoj?
4. Kie profesoro Kosadi faris historian esploron?
5. Kion profesoro Kosadi eksciis pri la trezoro en Vatikana biblioteko?
6. Kiel Marta eksciis pri la trezoro?

25

1. Kiel Marta ricevis fotokopion de la dokumento?
2. Kial Ronga enmiksiĝis en la aranĝon?
3. Kun kiu celo vizitadis Gerdan la frato de Marta?
4. Kiel oni povus kompreni, ke la aĉuloj agis amatore?
5. Kial Bob rigardas Gerdan kun iom stranga esprimo?

# Gravaj vorteroj laŭ ĉapitroj

ĉapitro	Afiksoj	Prepozicioj	Tabelvortoj	Gramatikaj finaĵoj		Personaj pronomoj	Ceteraj eroj
1.	(-ebl-) -in- mal-	al en kun	kio kiu nenio tiu	-a -o -e (-n)	-u -as (-i)	li mi vi	ho jen jes/ne kaj la nu plej sed tro
2.	-iĝ- re- -ul-	dum inter post	io iom	-n		ili lia ni ŝi	alia ĉu ke plu se
3.	-ebl-	ĉe de pri sur	kiel tio	-j	-i -is	ĝi	jam pli tuj
4.	-aĵ-	antaŭ por	kiam neniam			oni mia	do
5.	-uj- for-☆ -et- ek-	(for) da super	iu tiam tie tiel	-n*	-us		unu ĉi
6.				-n*			
7.	-ist-	ĝis		-n*	-os		ol
8.	-ej-	per ekster el tra	tien			si	aŭ eĉ mem ĉar
9.	sen-☆ -ind- -ar- -ad-	sen	kial kie neniu	-it-		sin	ajn
10.	mis- -em- -eg-						unua

## Gravaj vorteroj laŭ ĉapitroj (2)

ĉapitro	Afiksoj	Prepozicioj	Tabelvortoj	Gramatikaj finaĵoj	Personaj pronomoj	Ceteraj eroj
11.	-ig- -il-		ĉiam tia	-ant-		
12.	al-☆☆ (-on-)	laŭ apud	ĉio kiom tiom			ja kvankam
13.		(krom)	ie	(-at-)		
14.	-ec-		iam nenie	-at- -int-		du nck
15.						cent dck kvar
16.	-id- -aĉ-	krom je	kia			ok kvin mil naŭ tri ĵus
17.	ge- -an-	pro	ia			sep
18.			tial			
20.		trans sub	ĉiu	-ant-★ -int-★		scs
22.	-ec-★					
23.			kies			
24.	(-um-)					


### Rimarkoj:

(...) la ero aperas, sed la klarigo aperas en sekva ĉapitro


☆☆ tio ĉi estas apartaĵo de la libro:  
kelkajn prepoziciojn ĝi prezentas kvazaŭ sufiksojn

★ aldona klarigo


# Fruktoj & Legomoj



frambo



rubuso




frago



ĉerizo




vinberoj



pomo



piro




pruno



tomato




karoto



brasiko




terpomoj



banano



cepo



pizoj




laktuko



fungo



kukumoj



poreo




kapsiko



fazeoloj

# Bestoj



kulo



muŝo



cimo



rano



fiŝo



kobajo



ansero



anaso



kuniklo



koko



kato



porko



muso




hundo




testudo



vulpo



lupo




simio




ŝafo



azeno




bovo




leono




urso



baleno



ĉevalo



elefanto



ĝirafa

# Leteroj

familia nomo  
persona nomo  
adreso  
strato  
urbo  
poŝtkodo  
lando  
telefonnumero  
naskiĝdato  
sekso  
aliĝilo

*Komenci leteron oni povas per:*

Estimata profesoro Ronga!  
Estimataj gesinjoroj,  
Kara Gerda!  
Mia amata Linda,

*Fini leteron oni povas per:*

Atendante vian baldaŭan respondon, mi sincere salutas vin. Via ...  
Ĝojunte pri baldaŭa respondo, mi restas sincere Via ...  
Kun sinceraj salutoj, Via ...  
Kun (el-)koraj salutoj, Via ...  
Koran saluton.  
Estu milfoje kisata. Elkore Via ...

Vortoj ne troviĝantaj en GERDA

adreso  
kodo/poŝtkodo  
dato  
sekso


## Renkontiĝoj

Saluton! Bonan tagon/matenon/vesperon/nokton!  
Kie mi devas registriĝi? Kie troviĝas la akceptejo?  
Kiom kostas la plena kotizo/unutaga restado/ununokta restado?  
Kie troviĝas mia ĉambro/lito/kabano? Kie mi rajtas starigi la tendon?  
Kiel vi nomiĝas? Bonvolu literumi vian nomon!  
Kiel vi fartas? Ĉu bone?  
El kiu urbo vi venas? El kiu lando vi venas? - Provu diveni!  
Kiun naciecon vi havas? Ĉu la italan aŭ la svisan?  
Kie vi loĝas? En kiu urbo vi loĝas?  
Kion vi faras profesie? Ĉu vi studas/laboras? Kion kaj kie?  
Mi estas lerneĵano/studento/instruisto/profesoro/laboristo (pri...)/(ŝtat)oficisto/senlaborulo/pensiulo/hejmomastro/artisto/agrikulturisto/...  
Kiu estas via gepatra lingvo? Ĉu la hispana aŭ la portugala?  
Ĉu vi parolas aliajn fremdajn lingvojn? Kiujn? Ĉu la francan/anglan/rusan/germanan/italan/polan/ĉinan/araban/svahilan/japanan/korean/hindian/urduan?  
Kiam vi naskiĝis? Kiom aĝa vi estas? Kiom da jaroj vi havas?  
Ĉu vi havas gefratojn? Kiom da?  
Kiam vi esperantistiĝis? Kiam vi eklernis Esperanton? Kiel vi lernis Esperanton? Ĉu sole, grupe, skribinte, leginte, parolinte, aŭskultinte?  
Kiamaniere vi alvenis ĉi tien? Ĉu trajne, aŭte, buse, bicikle, piede?  
Ĉu vi restos ĉi tie ĝis la fino? Kiam vi forveturos de ĉi tie?  
La kioma horo estas? Kiomas? Ĉu jam la deknaŭa kaj kvardek? Vere malfruas!  
Kie okazos la venonta prelego/diskuto/aranĝo/evento/ludo?  
Kiam ni matenmanĝos/tagmanĝos/vespermanĝos?  
Ĉu mi rajtas preni tion/la botelon/la kruĉon/la pelvon?  
Mankas al mi manĝilaro/telero/kulero/tranĉilo/forko/glaso/taso/skribilo/papero.  
Kiom kostas la akvo/biero/kafo/teo/oranĝosuko/vino?  
Bonvolu alporti panon. - Mi deziras fruktojn. - Mi mendas salaton.  
Vi ja krokodilas! (Ili parolas nacilingve)  
Pardonu, kie estas la fumejo/la enirejo/la elirejo/la necesejo ("WC")/la teatrohalo?  
Multan dankon! - Ne dankinde/Volonte/Estis plezuro/Dankon al vi!  
Bonan apetiton! (Ili ekmanĝas) Sanon! Je via sano! Je nia bonfarto! (Ili levas siajn glasojn)  
Plu-e, plu-e! Aldonon! (Je la fino de bona koncerto)  
Ĝis! Ĝis poste! Ĝis baldaŭ! Ĝis revido! Ĝis morgaŭ! Ĝis venontfoje! Adiaŭ!  
Ĉion bonan! Fartu bone!

### Vortoj ne troviĝantaj en GERDA

registri	japana
kotizo	korea
kabano	hindia
litero/literumi	urdua
diveni	trajno
itala	biciklo
svisa	prelego
loĝi	evento
profesio	kruĉo
pensio	pelvo
mastro/hejmomastro	kulero
agrikulturo	tranĉilo
fremda	forko
franca	vino
rusa	krokodilo
germana	fumi
pola	halo
ĉina	volonte
araba	apetito
svahila	koncerto

# Tabelvortoj



# Tabelvortoj

	ki-	ti-	ĉi-	i-	neni-	<i>pluralo aŭ akuzativo:</i>	
-o	kio	tio	ĉio	io	nenio		-n
-u	kiu	tiu	ĉiu	iu	neniu	-j	-n
-e	kie	tie	ĉie	ie	nenie		-n
-a	kia	tia	ĉia	ia	nenia	-j	-n
-el	kiel	tiel	ĉiel	iel	neniel		
-am	kiam	tiam	ĉiam	iam	neniam		
-om	kiom	tiom	ĉiom	iom	neniom		
-al	kial	tial	ĉial	ial	nenial		
-es	kies	ties	ĉies	ies	nenies		


# Verboj, Participoj

	verba finaĵo	participoj	
infinitivo	-i		
imperativo	-u	aktiva	pasiva
pasinteco	-is	-int-	-it-
nuntempo	-as	-ant-	-at-
estonteco	-os	-ont-	-ot-
kondicionalo	-us	(-unt-)	(-ut-)

# Verboj, Participoj

	-i		
	-u		
	-is	-int-	-it-
	-as	-ant-	-at-
	-os	-ont-	-ot-
	-us	(-unt-)	(-ut-)


# Participoj



manĝonta



manĝota



manĝinta




manĝita



manĝanta

manĝata



manĝuta

manĝuta

# kunmetitaj tempoformoj

	-i	-u	-is	-as	-os	-us
-int-	1	2	3	4	5	6
-it-	7	8	9	10	11	12
-ant-	13	14	15	16	17	18
-at-	19	20	21	22	23	24
-ont-	25	26	27	28	29	30
-ot-	31	32	33	34	35	36

(-unt-)	<i>Jen kampo por ludemuloj. La neoficialaj formoj -unt- kaj -ut- estas certe kombineblaj kun verba finaĵoj, sed la rezultantaj formoj preskaŭ ne diferencas de la formoj fareblaj per -us kaj la aliaj 6 participoj (dekstra kolumno). Tial ili estas uzataj ĝis nun ege malofte, eksperimente, aŭ en poezio.</i>					
(-ut-)						

## Kunmetitaj tempoformoj - Ekzemplaj frazoj

Kunmetitaj formoj estu ŝpare uzataj ĉar foje ili aspektas iom pezaj. Ĉiuj sekvaj frazoj estas ankaŭ fareblaj sen kunmetitaj formoj, uzante anstataŭe simplajn tempojn kaj dependajn frazojn. Tiel, ilia signifo ofte ŝanĝiĝas nepercepteble malmulte. Ekzemplo:

Ŝi ĝojas esti trovinta bonan laboron ⇨ Ŝi ĝojas ke ŝi trovis bonan laboron

Eblas koncizigi la kunmetitajn formojn tiel ke, forlasante la helpverbon kaj adjektivan finaĵon, oni ligas la helpverban finaĵon rekte al la participa, laŭ la modelo:

Ŝi estus laborinta ⇨ Ŝi laborintus

La koncizigo sekve aperos nur ĉe tiuj tempoformoj, kie ĝi estas reale foje uzata.

- 1 Ŝi ĝojas esti trovinta laboron bone pagatan.
- 2 Ŝi esperas ke ankaŭ vi estu trovinta bonan laboron.
- 3 Post kiam ŝi estis trovinta laboron, ŝi rakontis tion al amikoj.
- 4 Li estas laboreginta kaj do ege laca.
- 5 Ĉi-vespere ŝi estos laborinta du plenajn tagojn.
- 6 Se mi sanus, mi estus hieraŭ laborinta en la oficejo.  
Se mi sanus, mi laborintus en la oficejo.
- 7 Instruisto devas esti bone informita pri sia fako.
- 8 Ŝi estu informita pri ĉio nova por povi rakonti pri ĝi.
- 9 Envenis malvarma aero post kiam la fenestro estis malfermita.
- 10 Ili estas bone informitaj, ĉar ili legas ĵurnalojn.
- 11 Ŝi iros en la universitaton por legi ĵurnalon. Kiam ŝi reestos hejme, ŝi estos bone informita pri ĉio nova.
- 12 Ankaŭ mi estus bone informita se mi estus leginta mian ĵurnalon.  
Ankaŭ mi bone informitus se mi legintus mian ĵurnalon.
- 13 Blindulo ĝojegus esti vidanta.
- 14 Vi estu bone vidanta se vi devas ŝofori aŭton.
- 15 Hieraŭ vespere mi estis laboranta, kiam amikoj alvenis por viziti min hejme.
- 16 Vi estas homo klarvidanta.
- 17 Li eklaboros morgaŭ. Ekde morgaŭ li estos homo laboranta.
- 18 Ankaŭ mi plezure estus homo laboranta, sed mi ĝis nun ne trovis laboron.
- 19 Mi ne volas daŭre esti ĝenata de via parolado.
- 20 Ŝi esperas ke li estu helpata de mekanikisto por ripari la aŭton.
- 21 Dum li malsanis, li estis flegata de sia patro.
- 22 Mekanikisto helpas lin. Li estas helpata de mekanikisto. Li helpatas de mekanikisto.
- 23 Li metos sian aŭton en riparejon. Espereble li estos tie helpata.
- 24 Li estus helpata en la riparejo se la aŭto estus ankoraŭ riparinda.
- 25 Kiam ŝi ekparolis kun la oficisto kiu decidas pri laborantoj, ŝi jam certis esti trovonta laboron por si.
- 26 Mi petis lin: "Ne estu ĉiam manĝonta kiam mi venas al vi. Vi ĉiam devigas min kunmanĝi."
- 27 Ŝi metis akvon en la glason kaj estis trinkonta ĝin, kiam subite aperis ŝia amiko.
- 28 Ŝi estas laca, ironta dormi.
- 29 Kiam li estos trinkonta akvon, ĝenu lin por ke li plu soifu.
- 30 Estante laca, ŝi estus ironta dormi, sed ŝi scias ke ŝi devas ankoraŭ labori.
- 31 La kafo estas ankoraŭ varma. Ĝi aspektas esti tuj trinkota.
- 32 La trinkaĵo varmiĝas; ĝi estu trinkota.
- 33 La akvo estis trinkota, sed ĝi ne estas trinkita, ĉar dume la soifulo devis ion priparoli kun amiko.
- 34 La trinkaĵo varmiĝas; ĝi estas trinkota.
- 35 Post kiam la akvo estos en la glaso, ĝi estos trinkota.
- 36 Se ni havus brandon, ĝi estus trinkota tuj kiam niaj amikoj ĝin ekvidus.

Novaj vortoj (ne enkondukitaj ĝis la ĉapitro 14)

blinda, ĵurnalo, hejme (18), hieraŭ (15), manĝi (16)

# Atiksoj

## Prefiksoj

bo-	-	bopatro; bofratino
dis-	-	disfali; disiĝi; dise
ek-	5	ekdormi; ekstari; eku!
eks-	-	eksamiko; eksinstruisto; eksa
fi-	-	filibro; fiulo; fie
ge-	17	gepatroj; gesinjoroj
mal-	1	malhela; maldekstra; malo; male
mis-	10	misuzi; miskompreni; misa
pra-	-	prahomo; pratempo
re-	2	revidi; resaniĝi; ree

## Sufiksoj

-aĉ-	16	domaĉo; hundaĉo; aĉe
-ad-	9	legadi; rigardadi; ade
-aĵ-	4	trinkaĵo; novaĵo; aĵo
-an-	17	urbano; kristano; ano
-ar-	9	homaro; vortaro; aro
-ĉj-	-	patro ⇒ paĉjo; onklo ⇒ oĉjo; Petro ⇒ Peĉjo
-ebl-	3	legebla; videble; eble
-ec-	14	klareco; beleco; homece; eco
-eg-	10	pordego; varmege; ege
-ej-	8	lernejo; laborejo; ejo
-em-	10	flegema; manĝema; emo
-end-	-	pagenda; farena; endas
-er-	-	panero; monero; ero
-estr-	-	urbestro; bibliotekestro; estro
-et-	5	tableto; maneto; hometo; eta
-id-	16	hundido; katido; ido
-ig-	11	satigi; unuigo; igi
-iĝ-	2	saniĝi; enamigi; iĝi
-il-	11	ŝlosilo; manĝilo; ilo
-in-	1	patrino; fraŭlino; ino
-ind-	9	vidinda; havinda; inda
-ing-	-	plumingo; botelingo; ingo
-ism-	-	naciismo; Budhismo
-ist-	7	bakisto; laboristo
-nj-	-	patrino ⇒ panjo; onklino ⇒ onjo; Linda ⇒ Linjo
-obl-	-	duobla; multoblige; oble
-on-	(12)	triono; onigi; ono
-op-	-	sesope; triopo
-uj-	5	monujo; sukero; ujo
-ul-	2	strangulo; manĝemulo; ulo
-um-	(24)	plenumi; tendumi; umi

## Prefiksoj

ek-	5	ekdormi; ekstari; eku!
ge-	17	gepatroj; gesinjoroj
mal-	1	malhela; maldekstra; malo; male
mis-	10	misuzi; miskompreni; misa
re-	2	revidi; resaniĝi; ree

## Sufiksoj

-aĉ-	16	domaĉo; hundaĉo; aĉe
-ad-	9	legadi; rigardadi; ade
-aĵ-	4	trinkaĵo; novaĵo; aĵo
-an-	17	urbano; kristano; ano
-ar-	9	homaro; vortaro; aro
-abl-	3	legebla; videble; eble
-ec-	14	klareco; beleco; homece; eco
-eg-	10	pordego; varmege; ege
-ej-	8	lernejo; laborejo; ejo
-em-	10	flegema; mangema; emo
-et-	5	tableto; maneto; hometo; eta
-id-	16	hundido; katido; ido
-ig-	11	satigi; unuigo; igi
-iĝ-	2	saniĝi; enamigxi; iĝi
-il-	11	ŝlosilo; mangilo; ilo
-in-	1	patrino; fraŭlino; ino
-ind-	9	vidinda; havinda; inda
-ist-	7	bakisto; laboristo
-on-	(12)	triono; onigi; ono
-uj-	5	monujo; sukerujo; ujo
-ul-	2	strangulo; mangemulo; ulo
-um-	(24)	plenumi; tendumi; umi

# Prepozicioj



en (1)



al (1)




kun (1)



post (2)



inter (2)



sur (3)



ĉe (3)



de (3)



pri (3)



antaŭ (4)



super (5)




ĝis (7)



el (8)



per (8)



tra (8)



*-ne en* ekster (8)



apud (12)



sub (20)



trans (20)



ĉirkaŭ (-)




preter (-)

# Prepozicioj



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_




\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



*= ne en*


\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_



\_\_\_\_\_

